

septembro 1971

64-a jaro

n-ro 789 (9)

esperanto

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — rotterdam-3002 — nederlando



**Londona
Forumo**

Vi trovos

ke ĉi tiu numero, konforme al longa tradicio, estas grandparte dediĉita al raportoj kaj ilustraĵoj pri la 56a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazis en la unua semajno de aŭgusto, en Londono. Ni tamen provas ne forgesi, ke tiu unusemajna manifestacio, kiom ajn sukcesa kaj inspira, ne prezentas la tutan aktivecon de la Esperanto-movado en tiu periodo. Tial ni klopodas resumi en tre koncentrita formo (p. 157) la ceterajn mondajn okazaĵojn, servi al la libroamantoj kaj komencantoj kaj, jen kaj jen, interpunkcii la raportojn per alispecaj eroj.

Ke la Kongreso kiel tuto postlasis tre pozitivajn impresojn ĉe la granda plimulto de la kongresanoj, tio ŝuldiĝas interalie al la entreprenemo kaj granda sindediĉo de la membroj de LKK, kion decas ankoraŭfoje rekoni ĉi tie.

La ĝeneralan kongresan raportadon plenumis ĉi-jare, unuafoje, la redaktoro, f-ino Nagata. La ĉefartikolan superrigardon pri la laboroj de la UK kompletigas la ĉi-paĝa listo de la aktualaj estraranoj, en kiu la interesitaj legantoj trovos detalojn pri la nova distribuo de kompetentecoj interne de la Estraro.

Enhavo

- 141 La Estraro por 1971-1974 — kaj ĝiaj taskoj
- 142 Ebligu al homoj interkompreni en ĉiu anguleto de la terglobo — Festoparolado en la 56a UK (Lapenna)
- 145 Promene tra la 56a
- 147 Rezolucioj
- 148 Ĉu defio al la angla lingvo en la metropolo de la angla? — Forumo pri lingva komunikado en la nuntempa mondo
- 148 Kimra lingvo en EEK?
- 149 EEK ne helpas verkistojn
- 150 Neŭtraleco de UEA — Ĉu la nuna laŭstatuta koncepto estas adekvata? — Debato
- 150 Internacia Somera Universitato
- 151 Nekrologo: Väisälä, honora patrono
- 151 Letero de leganto
- 152 Riĉa prezento de la arto — Artaj aranĝoj dum la 56a UK
- 154 Dekoj da fakaj kunvenoj dum la kongresa semajno
- 154 Kongresetis 75 infanoj el 14 landoj
- 154 Konkursoj Oratora kaj Belartaj
- 156 Recenzoj
- 157 Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)
- 158 Ĉu 100 x 100 egalas al 10 000? (Woessink)
- 158 Laste aperis ... (novaj eldonaĵoj)
- 158 Esperanto en radio
- 159 Komenco bona — ĉio bona
- 160 Oficiala informilo: n-ro 448

La kovrilo

prezentas, sur Tamiza fono, la protagonistojn de la Forumo pri la lingva problemo: maldekstre s-ron M. Macmillan de British Council, dekstre profesoron I. Lapenna, prezidanton de UEA.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1882-1910).

Ĉefredaktoro: V. Sadler.

Redaktoro: f-ino A. Nagata.

Inkluzivas la organon de TEJO "La Juna Vivo" (TEJO-paĝo).

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Abonprezo por unu kalendara jaro: 22,50 gld. (kun membreco kaj Jarlibro: 30,— gld.). Unuopa ekzemplero: 2,— gld. Por jara aerpoŝto aldonu: Aŭstralio, Nov-Zel-do 13,75; Arg. 11,—; Jap., Braz., Sud-Afr. 8,25; Kan., Uzo., Meks. 5,50; Isr. 2,75 gld.

Anonc-tarifo: 1 p. 285 gld., 1/2 p. 150 gld., 1/4 p. 85 gld., 1/8 p. 50 gld. 1/16 p. 35 gld. Ripet-rabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Blaak 10, Rotterdam-3001.

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telefono: (010) 36 15 39.

Telegramadreso:

ESPERANTO ROTTERDAM.

Kompostita kaj fotografita en la Centra Oficejo de UEA.

Presita ĉe Grafika Entrepreno Tuijtel en Hardinxveld, Nederlando.

Legantoj en 89 landoj.

estraro de uea

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj: Prof. d-ro Ivo Lapenna, 77 Grasmere Ave., Wembley, Mddx, HA9 8TF, Britujo.

Vic-prezidanto kaj estrarano pri administrado kaj komercaj kaj industriaj rilatoj: E.L.M. Wensing, Postbus 412, Eindhoven, Nederlando.

Vic-prezidanto kaj estrarano pri turismo kaj aŭtomobilismo: E. Carlén, Yxhult, S 690 60 Hällabrottet, Svedujo.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado, delegita reto, junularo kaj diskonigo de la agado de UEA: G. Becker, D-6653 Blieskastel, Alter Hangarten 2, F.R.Germanujo.

Estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj kaj pri organiza plifortigo: D-ro W. Bormann, D-205 Hamburg 80, Schärstr. 26, F.R.Germanujo.

Estrarano pri kulturaj aferoj: J. Uśpieński, Warszawa-12, Poŝtkesto 100, Pollando.

Estrarano pri kongresoj kaj konferencoj: D-ro J.C. Wells, 17 Ashbourne Terrace, London SW19 1QX, Britujo.

Estrarano pri financo: E.J. Woessink, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.



En la Estraro por 1971-1974, elektita en Londono, aperas du novaj nomoj: d-roj Bormann kaj Wells. La foto (el la Fermo) montras ses el la estraranoj, krom la honora prezidanto kaj la direktoro de la C.O. De maldekstre: s-ro Wensing, prof. Lapenna, d-ro Sadler, s-ro Becker, d-ro Wells, d-ro Bormann, s-ro Holmes kaj s-ro Woessink.

La Estraro por 1971-1974 – kaj ĝiaj taskoj

La jaro 1971 estis elekto-jaro. Jam antaŭ la Universala Kongreso en Londono la aliĝintaj landaj kaj fakaj asocioj nomis siajn novajn reprezentantojn en la Komitato de UEA, la tiel nomatajn komitatanojn 'A'. Siaflanke, ankaŭ la tutmonda delegitaro de UEA nomis siajn kandidatojn kaj per skriba baloto elektis siajn komitatanojn 'B' (vidu sur la paĝo 160). En Londono, tiuj 51 'A' kaj 6 'B' havis la rajton mem elekti 14 pliajn komitatanojn: la komitatanojn 'C'. Elekto-jaro estas turniĝa punkto: tempo por prijuĝi la laboron de la pasinta oficperiodo kaj por rigardi antaŭen al la venontaj tri jaroj – kun novaj homoj kaj freŝaj fortoj. Ĝi estas tempo, kiam malnovaj komitatanoj turnas sin al aliaj kampoj, kaj novaj nomoj aldoniĝas al la listo de tiuj, kiuj direktas la sorton de la Asocio. El la listo forstrekiĝis ĉi-jare nomoj eĉ tre konataj: Bagger, Bakker, Lins, Maitzen, Markarian, Óhúiginn, Pettyn, Röhl, Sturzenegger, Tonkin, Zlatnar. Iliajn lokojn transprenis: Ahomäki, Denoël, Greutert, Ursula Grattapaglia, Li unsang, Matte, Mischler, Pool, Schleicher, Schmid, Šaponjić, Vermaas kaj nova observanto Fettes.

Elekto de la nova Estraro

Tiuj 71 komitatanoj – aŭ, pli ĝuste, tiuj el ili (la granda plimulto), kiuj mem ĉeestis en Londono aŭ nomis anstataŭanton – havis la taskon elekti inter si la novan Estraron. Ĝi konsistas, laŭstatute, el maksimume ok personoj. Ĉar – eble kurioze – ne ekzistas reguloj pri la proceduro por tiu elekto, ĝi povas okazi en tre diversaj manieroj, laŭ la bontrovo de la Komitato.

Ĉi-jare la Komitato decidis unue elekti la novan prezidanton. Prezentiĝis du kandidatoj: prof. Lapenna kaj s-ro Wensing, la ĝisnunaj prezidanto kaj vic-prezidanto respektive. En sekreta baloto venkis profesoro Lapenna per 26 voĉoj kontraŭ 21 (tri sindetenis). La prezidanto unue elektita en Hago en 1964 do plue gvidos la Asocion almenaŭ ĝis 1974.

La novaj vizaĝoj

Por plenigi la ceterajn sep lokojn en la Estraro estis proponitaj 10 kandidatoj. En plia sekreta baloto la

Komitato elektis jenajn: J.C.Wells; E.L.M.Wensing; E.Carlén; G.Becker; J.Uśpieński; E.J.Woessink; W. Bormann. Tio signifas, ke la konsisto de la Estraro restas grandparte senŝanĝa. Novaj estraranoj estas ĉi-foje nur du: d-roj Wells kaj Bormann.

John Wells, lektoro pri fonetiko en tiu sama kolegio de la Universitato de Londono, en kiu okazis la Kongreso, estas membro de la Akademio de Esperanto. Kiel prezidanto de LKK en Londono li akiris praktikajn sciojn pri kongresaj laboroj, kiuj bone servos al li en lia nova funkcio: estrarano pri kongresoj kaj konferencoj.

Werner Bormann, kiu transprenas en la nova Estraro respondecon pri landaj kaj fakaj asocioj kaj pri organiza plifortigo, alportas al tiu ofico fakan sperton de ekonomiisto kaj direktoro de ministeria departemento. Li estas jam plurjara prezidanto de Germana Esperanto-Asocio kaj komisiito de UEA pri la agado en Eŭropo.

Intensigata agado en Eŭropo

Ĝuste la agado en Eŭropo ricevis novan emfazon en la nuntempa agado. Novaj aliĝpetoj al la Eŭropa Ekonomia Komunumo signifas fortan intensigon de la lingva problemo en tiu kontinento, kion respegulas la monda gazetaro kaj la sukcesa Forumo en la kadro de la 56a UK. Komitata komisiono preparis trafan rezolucion (vidu p. 147), kiu estos la bazo por vasta informkampanjo en la nuna jaro. Laŭ plano akceptita en Londono, sekvos en 1972 memorandoj al la eŭropaj registaroj kaj okazigo de plurlandaj kongresoj. Por 1973 la plano antaŭvidas grandan komunan kongreson de la landaj asocioj de la Komuna Merkato kaj por 1974 – espereble – eldonon de la konkludoj de oficiala esplorkomisiono.

Ankaŭ por tiu laŭplana agado en Eŭropo, same kiel sur aliaj kampoj, donos tre gravan apogon la varbado de subskriboj inter parlamentanoj kaj registaranoj, sub gvido de speciala komisiito s-ro Ib Schleicher. Tiu kampanjo celas havigi dokumentan pruvon pri la favora sinteno al Esperanto de parlamentanoj tra la tuta mondo kaj samtempe daŭre informadi ilin pri la

Ebligu al homoj interkompreni en ĉiu anguleto de

— Festoparolado en Londono

La esenco mem de la Internacia Lingvo el vidpunkto de ĝiaj strukturo, praktikaj utiligoj kaj perspektivoj estas universaleco en ambaŭ ĉefaj sencoj: la horizontala, nome teritoria etendiĝo al la tuta terglobo, kaj la vertikala, nome apliko en ĉiuj sciencaj branĉoj, en ĉiuj fakoj kaj aliaj specialaj sferoj. Tial kia ajn atingi, unuavide eĉ la plej bagatela, en kiu ajn loko, eĉ la plej izola vilaĝo, aŭ en kiu ajn sfero, eĉ la plej limigita, ĉiam havas efektive internacian valoron, ĉar ĝi kontribuas almenaŭ ereton al ĝenerala plivalorigo de Esperanto kiel instrumento de lingva komunikado ne en lokaj aŭ landaj kadroj, sed en mondaj dimensioj. Temas ja pri kvantoj, ofte etaj kaj nerimarkeblaj, kies daŭra akumiliĝo ŝanĝas la socian funkcion de la Internacia Lingvo en pozitiva senco, kaj fine donas al ĝi tiun novan kvaliton, kiun indikas ĝia nomo. Tio estas senduba fakto.

Aliflanke, oni ne povas ne rimarki, ke en tiu procezo de socie-kvalita transformiĝado kelkaj landoj, pro ilia eksterordinare forta pozicio en la interŝtataj rilatoj havas tute apartan signifon ankaŭ por la sorto de la Internacia Lingvo.

Al tiuj landoj unuavice apartenas Britujo kaj ĝia ĉefurbo Londono, la lulilo kaj fortikaĵo de la angla, kiun la angloj kaj entute la angle parolantaj popoloj

prave amas kaj admiras, same kiel ĉiu popolo amas kaj admiras sian lingvon; kiun multaj subjektivisme rigardas kiel la internacian lingvon de la nuntempo, kaj al kiu ni, la adeptoj kaj protagonistoj de la neŭtrale homa Internacia Lingvo, ja rilatas kun profunda respekto — same kiel ni tion faras koncerne ĉiun ajn alian lingvon — kiun tamen ni objekte klasigas ne kiel internacian lingvon en kiu ajn senco, sed kiel unu el la multnombraj naciaj lingvoj, verŝajne la plej potenca, uzataj hodiaŭ ankaŭ kiel helpaj komunikiloj en interŝtataj, internaciaj kaj intergentaj rilatoj.

La fakto, do, ke en la fajrujo mem de la angla jam en 1902 formiĝis en Keighley la unua Esperanto-societo; ke du jarojn poste, en 1904, fondiĝis Brita Esperantista Asocio — hodiaŭ tutcerte unu el la plej solidaj landaj organizaĵoj de UEA — kaj ke en Londono mem funkcias, seninterrompe ekde 1903, unu el la plej grandaj kaj bonaj lokaj Esperanto-societoj, apartenis kaj plu apartenas al la kategorio de tiuj elementoj, kiuj aldonas ne ereton, sed konsiderindan pezon al la internacia plivalorigo de Esperanto.

Tiom, plej koncize, pri la brita, unuavice londona, rolo sur la monda lingva scenejo en rilato al ambaŭ lingvoj: la angla kaj — multe pli modeste, sed por nia afero multe pli grave — la Internacia.

IVO
LAPENNA

La Estraro por 1971-1974 — kaj ĝiaj taskoj

(daŭrigo de p. 141)

progreso de la lingvo. Ĝi uzos kiel bazon la Proponon al Unuiĝintaj Nacioj (1966) kaj la kontaktojn ligitajn en tiu tempo. En Danlando s-ro Schleicher jam ricevis la subskribojn de du trionoj de la nuna parlamento kaj unu triono de la nuna registaro. Similaj rezultoj en aliaj landoj donus grandan forton al niaj argumentoj. (Artikolo sekvas en ĉi tiu revuo).

Du aliaj rekomendoj por la landaj asocioj (kaj lokaj societoj): festi, ekzemple per artikoloj, prelegoj k.s., la 25-jaran datrevenon de Unesko en decembro 1971 kaj organizi, laŭ la landaj aŭ lokaj eblecoj, unu fojon jare 'Esperanto-Tagon'. (Tia tago en Belgujo, la 8-an de majo, havis grandan sukceson. Ĉirkaŭ 300 personoj manifestaciis sur la placo antaŭ la domo de radio kaj televido, postulante TV-kurson de Esperanto.)

Trijaraj laborplanoj?

Alia komisiono de la Komitato dediĉis sian atenton al la planado de nia estonta laboro. La jam ekzistanta Laborplano (akceptita en 1962) estas parte jam plenumita, parte malaktualiĝis. La ŝanĝiĝantaj mondaj cirkonstancoj postulas, ke ni de tempo al tempo reelpensu nian strategion. Internacia komisiono starigita en Londono ellaboros novan Laborplanon. Ĝi

antaŭvidas bazan laborplanon, kiu difinos la ĝeneralan strategion, kaj periodajn laborplanojn — verŝajne trijarajn — kiuj fiksos la konkretajn taskojn.

La Komitato diskutis ankaŭ la rilatojn inter UEA kaj ĝia junulara sekcio TEJO. En la pasinteco ili ofte montriĝis nekontentigaj, ne nur el vidpunkto financa sed ankaŭ rilate la disdividon de respondecoj inter la du organizaĵoj. La Komitato siaflanke akceptis projekton pri novaj rilatoj kaj transdonis ĝin al la TEJO-Komitato, akcentante 'la principon de aŭtonomeco de TEJO sur specifaj kampoj kaj samtempe de ĝia respondeco kiel sekcio de UEA'.

Granda parto de la oficialaj laborkunsidoj ĉiam pritraktas aferojn, kiuj, kvankam necese traktendaj, ne povas interesi vastan publikon. La Komitato, ekzemple, devis revizii la Ĝeneralan Regularon rilate al novaj delegitoj; aprobi la kontojn, bilancojn kaj buĝetojn de UEA kaj CED, diskuti kaj aprobi la Estraran Raporton kaj Raporton de CED; pritrakti amason da komisionaj raportoj kaj proponoj. Kiel kutime, ĝi konsideris en siaj diskutoj pri financo la nunan kotizsistemon. Ĝi decidis iom altigi la kotizojn por fakaj asocioj, el kiuj unu restis senŝanĝa jam dum minimume 15 jaroj!

Tamen estas eble fini ĉi tiun raporton per la por ĉiuj bonvena sciigo, ke ĉiuj kotizoj de asociaj kaj individuaj membroj restas plue senŝanĝaj, malgraŭ la ĉiam pli rapide kreskanta inflacio.

V. S.

a terglobo

Certe unu el la plej imponaj (kaj komfortaj) inaŭgurejoj en la historio de la Kongresoj — Royal Festival Hall — akceptis 14 ŝtatajn reprezentantojn, aron da ĵurnalistoj kaj aliaj observantoj kaj preskaŭ du mil kongresanojn.



Aldone al tiu ĝenerala kontribuo de Britujo al la tutmonda Esperanto-movado — fakte valorega kontribuo ĝuste por la escepte forta pozicio de la angla —, tuta aro da specialaj klopodoj en tiu ĉi lando, kronitaj kutime per rimarkindaj sukcesoj, riĉigis la lingvon interne kaj fortikigis ĝian internacian prestiĝon ekstere. Inter la multaj, menciindaj estas la ampleksa kreado sur literatura kampo; la avangarda rolo de la fekunda skota skolo, kies ĉefaj fondintoj kaj verkistoj estas en niaj vicoj; la modela instruado de Esperanto en relative granda nombro da lernejoj; la aktiva partoprenado de la plej konataj britaj esperantologoj-lingvistoj en la laboroj de la Akademio; la ĉiama efika subteno de niaj britaj geamikoj al ĉiuj mondaj kampanjoj ne nur per fortostreĉoj personaj, sed ankaŭ per malavara helpo financa; kaj ne laste pro la granda, verŝajne la plej granda Esperanto-biblioteko en la mondo, kiu troviĝas ĝuste en Londono. Sen Britujo, la Internacia Lingvo tute ne estus tio, kio ĝi estas hodiaŭ.

II

En ligo kun la ĵus dirita, du historiaj eventoj, ligitaj ĝuste al Londono, meritas konsideron pro sia internacia aktualeco. La unua estas la fama parolado de Zamenhof en Guildhall de Londono en 1907, tuj post la tria Universala Kongreso de Esperanto en Cambridge, kiun jam menciis la lordurbestro en sia letero direktita al ni. En ĝi li energie refutis la maljustajn kulpigojn, ke la uzantoj de la Internacia Lingvo ne estas bonaj patriotoj. Levante sian voĉon kontraŭ tiaj riproĉoj, li diris interalie, ke la uzado de Esperanto kaj la laboro por ĝia disvastigo, unuflanke, kaj sincera patriotismo, ne ŝovinismo, aliflanke, ne povas esti malamikaj inter si. Lasante flanke la iom idealisman formon, en kiu Zamenhof formulis sian penson, la esenco de lia reago povas taŭge aplikiĝi al la nunaj kondiĉoj. Ne malofte ankaŭ hodiaŭ oni aŭdas, en tiu aŭ alia formo, la samajn aŭ similajn senbazajn dirojn.

Ekzemple, oni asertas, ke ni estas kontraŭ la naciaj

lingvoj, aŭ eĉ ke ni celas forigi kaj neniigi ilin, ĉar ni agas favore al la ĝeneraliĝo de la uzo de Esperanto en internaciaj rilatoj. Nu, estas vero, ke ni pledas por tiu simpla, justa kaj racia solvo. Estas ankaŭ vero, ke tion ni faras des pli insiste, ĉar ne abstrakta teoriomado aŭ teoriaj spekulacioj, sed jam tre vastaj kaj ĉiuflankaj realaj spertoj montras pli ol evidente, ke Esperanto ja perfekte taŭgas kiel rimedo de internacia lingva komunikado.

Ĉu pro tio oni rajtas imputi, ke ni ne respektas la naciajn lingvojn? Aŭ, eble, ĉu precize la malo ne estas vera? Ĉu en tiu kunteksto kaj rilate tiun specifan aspekton de la lingva demando ne estas pli ĝuste diri — kaj diri tion tre firme kaj energie — ke precize pro nia profunda amo al la regionoj, kiuj nin naskis kaj al iliaj dialektoj kaj lokaj parolformoj; precize pro la miloj da fadenoj ligantaj nin tradicie, historie kaj kulture al niaj respektivaj naciaj kolektivoj, ni ĉiuj estas intelektu kaj emocie alkroĉitaj al niaj naciaj lingvoj, kiujn ni bezonas por ĉiutaga rilatado kaj kiujn ni tial deziras konservi kaj plu flegi kun la tuta amo, kiun ili meritas, ĉar nacia lingvo estas unu el la esencaj elementoj de la koncepto mem „nacio“ kaj la ĉefa instrumento de ĉiu nacia kulturo, ŝtoneto en la multkolora mozaiko de la monda kulturo. Inter la multaj aliaj kaŭzoj, ankaŭ pro tio ni pledas por Esperanto.

Aliflanke — pro la kapturte rapida evoluo de la interŝtataj kaj interpopolaj kontaktoj en ĉiuj sferoj de la socia vivo, la demando de komunikado ne nur per signoj, signaloj kaj similaj rimedoj, sed per lingvo plenvolara, prezentiĝas kiel ĉiam pli premanta. La problemo sentiĝas ĉie kaj ĉiam pli akute. Ne nur en la densa reto de mondaj interligoj, sed ankaŭ en dimensioj kontinentaj, ekzemple en Eŭropo, kaj interne de unuopaj ŝtatoj ĉu plurnaciaj ĉu naciaj kun etnaj kaj lingvaj minoritatoj. Verŝajne ne ekzistas hodiaŭ unusola regno, kiu ne frontas en pli aŭ malpli alta grado internajn lingvajn malfacilaĵojn. La lingva demando ĝeneraliĝis kaj fariĝis unu el la

Tri ĉefaj punktoj

(daŭrigo de p. 143)

ĉefproblemoj de la nuntempo sur ĉiuj niveloj: landa, kontinenta, monda.

III

La eksterordinara graveco de la demando kuraĝigis la Estraron dediĉi unu tutan ĝeneralan kunvenon al la lingva komunikado en la moderna mondo. Kompreneble, en nuraj kelkaj horoj oni povos pritrakti nur la bazajn elementojn de la temo, sed ni deziras fari tion sur scienca nivelo, senpasie, objekte. Invitoj estis senditaj al la Sekretariato de Unesko, al konataj lingvaj instancoj de diversaj landoj kaj al pluraj specialistoj, kiuj havos la eblecon plej libere prezenti siajn starpunktojn. Tute certe estos reprezentitaj, en tiu unika kunveno, British Council rilate la anglan kaj Goethe Institut rilate la germanan; espereble ankaŭ aliaj.

La alia ĉeftemo de nia Kongreso, iusence subtemo de la unua, estas la agado en Eŭropo, kiun pritraktos aparta kunveno de reprezentantoj el eŭropaj landoj kaj aliaj interesitoj. La lingva demando en Eŭropo, kiel parto de la ĝenerala lingva problemo, ekzistas jam delonge, sed en la lastaj monatoj ĝi ricevis novajn formojn, eĉ tre akrajn, en ligo kun la ebla aliĝo de Britujo al la Komuna Merkato. Ne estas nia tasko esprimi kian ajn opinion pri la dezirindeco de aliĝo aŭ nealiĝo de Britujo al la nuna Eŭropo de Ses (= Eŭropa Ekonomia Komunumo – red.), sed ni ne povas ne atentigi, ke, aldone al ekonomikaj kaj politikaj konsideroj, la lingva demando latente brul-etis sub la surfaco de la ŝajna ekvilibro de la kvar oficialaj lingvoj en la institucioj de la Komuna Merkato. Ĝi estis esence grava ekde la komenco de tiu longjara diplomatia negocado rilate la aliĝon de Britujo.

La lingva disputo ekflamis, ĉefe pro la deklaro de s-ro Pompidou, prezidanto de Francujo, al la brusela *Le Soir* kaj en intervjuo por la brita televido la pasintan majon, ke la franca lingvo devos konservi sian gvidan pozicion ankaŭ post la aliĝo de Britujo kaj malgraŭ la formala jura egaleco de ĉiuj lingvoj de landoj apartenantaj al la Komuna Merkato. Timante la kreskantan influon de la angla, li akcentis, ke ĝi estas ankaŭ la lingvo de Usono. Tial, se Eŭropo deziras konservi sian propran karakteron kaj personecon, ĝi devas akcepti la francan. Kompreneble, s-ro Pompidou ne venis eĉ al ideo, ke la germana, itala, nederlanda aŭ kiu ajn alia nacia lingvo de la kontinenta Eŭropo povus plenumi la saman rolon, se la aliaj eŭropaj ŝtatoj konsentus, nek li pensis, ke finfine Eŭropo, eĉ ne tiu limigita al la Komuna Merkato, ne konsistas sole el Francujo.

Tio, tamen, ne interesas nin en la nuna momento. Multe pli interesa estas la pasieco de la diskuto, kiu sekvis en la radio, televido, popularaj gazetoj kaj ankaŭ en la plej seriozaj. La partieca karaktero de la argumentoj, kontraŭargumentoj kaj pseŭdoargumentoj favore al tiu aŭ alia lingvo, kaj la tuta ekstreme pasieca tono de la debato, fakte pravigis neniun, sed

nur pruvis ankoraŭfoje, ke lingvo ne estas biciklo, aŭtomobilo, radio, televida aparato aŭ kiu ajn alia teknika komunikilo, sed io multe pli, efektive io esence diferenca: fenomeno socia, nedisigebla de la historia formiĝo de ĉiuj sociaj kungrupiĝoj inkluzive la modernajn naciojn, ĉefa elemento de ilia identeco, instrumento de pensado kaj sentado, al kiu la koncernaj kolektivoj kaj la unuopuloj el kiuj ili konsistas estas profunde ligitaj ankaŭ emocie.

Ĝuste tial, ŝajnas al ni, la prema neceso trovi rimedon por lingva interkomunikado ĉu en la mondo, ĉu aparte en Eŭropo, ne estas radikale solvebla per iu ajn nacia lingvo sen mortdanĝero por ĉiuj aliaj kaj tial sen nevenkebla rezisto de la aliaj nacioj.

Ekzistas, sekve, nur la alia alternativo: la akcepto de la politike kaj nacie neŭtrala Internacia Lingvo, kiu pro sia tuthomeco donas avantaĝojn al ĉiuj kaj samtempe protektas la ekzistojn kaj la pluajn evolueblecojn de ĉiuj naciaj lingvoj, grandaj kaj malgrandaj, kaj de la naciaj kulturoj kreitaj per ili.

La dua memorinda evento estas la 30-a Universala Kongreso en Londono en 1938, do precize antaŭ 33 jaroj. Ĝi okazis en periodo de grandaj internaciaj tensioj, kiuj klare anoncadis la alvenontan katastrofon. Ankaŭ tiam leviĝis la demando de neŭtraleco de UEA. Multaj opiniis, ke UEA, kvankam politike neŭtrala, ne povas kaj ne rajtas resti indifera rilate la demandon de paco kaj milito, agreso kaj defendo. Efektive pluraj levis siajn voĉojn kontraŭ la tiama internacia terorismo kaj kruelaj internaciaj krimoj. UEA kiel tia tamen restis neŭtrala.

Ekde 1938 kaj precipe 1908, kiam la principo de neŭtraleco estis unue formulita, multo ŝanĝiĝis. Kvankam ĝi estis amendita kaj precizigita en 1947, en la lasta tempo aŭdiĝis voĉoj, precipe en la vicoj de nia junularo, ke necesus revizii la principon de neŭtraleco. Do, ankaŭ tiu demando troviĝas en la programo kaj ĝi estas la tria ĉefa temo, kiu elvokis interesiĝon ne nur interne de UEA, sed ankaŭ ekster ĝiaj vicoj. La debato montros, ĉu la principo de neŭtraleco estas adekvata aŭ necesas ŝanĝi ĝin, kaj, se jes, en kiu senco.

* * *

Post kelkaj minutoj finiĝos tiu ĉi inaŭgura solenaĵo kaj komenciĝos la laboro de la Kongreso. En la abunda programo ĉio estas grava, sed la tri menciitaj punktoj sendube elstaras. Sukcesa solvo de ĉiuj tri povus formi solidan bazon por plua sukcesa agado de Universala Esperanto-Asocio en la sekvantaj jaroj.

En sia fonografa mesaĝo al la Londona Klubo en 1904 Zamenhof diris: „Londono longe dormis, sed kiam ĝi vekiĝos, ĝi estos kiel vekiĝo de leono. Potenca voko iros el Londono kaj ĉiam pli kaj pli sonados kaj resonados en ĉiuj partoj de la mondo.”

Estu nia 56-a Universala Kongreso plensukcesa. Estu la voĉo de la Londona Kongreso potenca voko al ĉiuj popoloj kaj iliaj registaroj, ke ili urĝe kaj plej serioze alfrontu la lingvan demandon, solvu ĝin radikale kaj ebligu fine al ordinara homoj kompreni kaj komprenigi sin ĉie, en ĉiu anguleto de la terglobo, ne per gestoj kaj signoj, sed per komuna plenaloro, vere internacia lingvo laŭ maniero digna de homo en la fino de la dudeka jarcento.

PROMENE TRA LA 56-A

En la ĉefurbo de Britujo, lando, kiu estas fortikaĵo de la angla lingvo (malgraŭ la pluvivo de la kimra lingvo en Kimrujo kaj la enfluo de grandaj grupoj da alilingvaj enmigrantoj), okazis de la 31a de julio ĝis la 7a de aŭgusto la 56a Universala Kongreso de Esperanto kun 2071 partoprenantoj el 40 landoj. Bonvenigis ilin unuavice afiŝoj kun teksto "Bonvenon al Londono" dismetitaj ĉe subteraj stacidomoj k.a., kaj trafikindikiloj montrantaj la direkton al la kongresejo, prizorgitaj de LKK.



La vojojn al la Kongresejo formis modernaj oficejaj domoj, hoteloj ĉiaspecaj, trankvilaj placetoj kaj — klaraj indikiloj.

Pluraj ŝtataj reprezentantoj salutis Esperante

La plej granda internacia manifestacio de la parolantaro de Esperanto, la Inaŭguro de la Kongreso, okazis en impona halo de la moderna konstruaĵo "Royal Festival Hall", kun muzika interpunkcio de "Trio Stadler" (piano, klarneto, aldviolono). Malfermis la Kongreson la prezidanto de UEA prof-o Ivo Lapenna, kiu samtempe legis la mesaĝon de la Alta Protektanto kavaliro Peter Studd, urbestro de Londono, adresitan al la 56a UK.

Sekvis bonvenigo fare de la prezidanto de LKK, d-ro J. C. Wells, kun spritaj rakontoj pri la kunekzistado de la moderna kaj tradicia flankoj en Britujo.

Ĉi-jara karakterizo en la Inaŭguro estis, ke 50% de la ŝtataj reprezentantoj, kiuj salutis la Kongreson, parolis Esperante, kaj ke la ceteraj 50% parolis en sia nacia lingvo (kun interpreto en Esperanton), ne uzante alinacian lingvon. Reprezentigis la jenaj 14 ŝtatoj: Aŭstrujo (d-rino A. S. Schosland, Aŭstra Instituto), Belgujo (G. van der Espt, kultura konsilanto), Bulgarujo (K. Vălev, nome de la ministro de eksterlandaj aferoj), Danlando (gazetara ataŝeo Albertsen), Francujo (G. Rougetet, nome de la franca ambasadoro), Federacia Respubliko Germanujo (d-

rino Grützner), Grekujo (George Angeloglou, gazetara ataŝeo), Hungarujo (K. Docze, aferŝarĝito), Japanujo (Jukaŭa Morio, ambasadoro en Londono), Nederlando (J. B. Braaksma, konsilanto por kulturaj aferoj), Norvegujo (Kaare Bryn, vickonsulo de la ambasado), Pollando (Janusz Zabłocki, aferŝarĝito), Svedujo (d-ro E. Vilborg) kaj Vjetnama Respubliko (Cao Xuan Tu, Unua Sekretario): El tiuj la reprezentantoj de Norvegujo kaj Vjetnama Respubliko ĉeestis nur kiel observantoj. (Laŭ la posta informo de la ambasado de Urugvajo, ĝia registaro decidis reprezentigi, sed la instrukcio al la ambasado venis tro malfrue, kaj la itala registaro ne reprezentita bondeziris al la Kongreso per letero.)

Tuj post la salutoj de la reprezentantoj de Skolta Monda Oficejo kun pli ol 12 milionoj da membroj kaj de la 12a Internacia Infana Kongreseto, sekvis salutoj de 28 Landaj Asocioj aliĝintaj al UEA: argentina, aŭstralia, aŭstra, belga, brita, bulgara, ĉeĥa, dana, finna, franca, F.R.-germana, greka, hispana, hungara, irlanda, israela, itala, japana, jugoslavia, kanada, korea, nederlanda, norvega, nov-zelanda, pola, sveda, svisa, usona. El la nealiĝintaj Landaj Asocioj salutis la Kongreson la D.R.-germana, islanda, rumana kaj slovaka. El Unuiĝinta Araba Respubliko kaj Portugalujo, kie ankoraŭ ne ekzistas organizita movado, salutis respektive d-ro Nassif Isaac kaj s-ro M. Firme Pimenta.

Post muzika punkto de la Trio, la tradician festoparoladon faris prof-o Ivo Lapenna pri aktualaj facetoj de la lingva problemo (vidu p. 142). Sendube lia prelego impresis pozitive ankaŭ ne-esperantistajn observantojn, ĉu ĵurnalistajn ĉu ŝtatrepresentantajn.

Multaj kongresanoj ĝuis post la Inaŭguro komunan lunĉon en "Royal Festival Hall".

Labirinta kongresejo — kun bona akustiko

Ricevinte la luksan dokumentujon kun diversaj dokumentoj, la kongresanoj komencis vagadi en la kongresejo, unu kolegio de la Universitato de Londono por trovi tiun aŭ alian kunvenejon, kelkfoje eĉ tra laboratorio aŭ trans vojeto malantaŭ kaban-aspekta konstruaĵo. Supozeble la kongresanoj estis relative kontentaj pri ĉio, escepte de tiu labirinteco de la kongresejo, precipe pri la bona akustiko kompare kun tiu de la pasintjara kongresejo en Vieno.

Abundaj programeroj kun novaj elementoj

La Kongreso enhavis kulturajn, laborajn kaj festajn aranĝojn kiel kutime, sed kun novaj elementoj.

Kiel la kulturaj aranĝoj okazis Internacia Somera Universitato, Belarta kaj Oratora Konkursoj, Brita Vespero, Teatra Prezento, Filmprezento, nova programero Kanta Vespero, Kultura Vespero ktp. Inter la laboraj aranĝoj, krom la kunvenoj de la Komitato, Estraro kaj komisionoj, estis nove provita publika kunveno Forumo, ĝeneralaj kunvenoj, Debato, kaj aliaj diversaj fakaj kunvenoj, interalie kunvenoj

Promene tra la 56-a

(daŭrigo de p. 145)

de TEJO. Oficiala Balo (al kiu aldoniĝis spritaj skeĉoj fare de s-ro Don Lord), Junulara Balo kaj Bankedo estis kulmino de la festaj aranĝoj.

Krome okazis la oficiala akcepto de la urbo Londono, kiun ĉeestis prok-e 200 invititaj personoj. Akceptis ilin la anstataŭanto de la Lordurbestro.

En la Internacia Ekzameno, 2 kandidatoj estis ekzamenitaj.

Unua Ĝenerala Kunveno de UEA

En la 1a Ĝenerala Kunveno, kiun ĉeestis proks-e 500 UEA-membroj, salutis la Kongreson, sub la prezido de la vicprezidanto E. L. M. Wensing, jenaj fakaj organizaĵoj krom TEJO (la junulara sekcio de UEA), Instituto Hodler '68 kaj Pola Radio: aŭtomobilista, blindula, fervojista, fratecista, instruista, katolika, mondciivitana, ornitologa, sciencista, skolta kaj studenta.

La Raporton de la Estraro pri la agado de UEA dum la jaro 1970/71 oni pritraktis surbaze de la klarigado fare de la ĝenerala sekretario G. Becker. Faris demandojn aŭ esprimis opiniojn s-ino Iva Åberg el Svedujo, s-roj F. Simonnet kaj R. Jossinet el Francujo, s-ro Mark Starr el Usono.

Rilate al la raporto pri la agado de CED por la sama periodo, pastro M. Casanoves el Hispanujo demandis pri la sistemo de laboroj de CED, al kio la direktoro de CED prof-o Lapenna respondis, ke CED daŭre invitas homojn anonci sin por kunlaborado kaj ke dank' al tiaj sindonaj kunlaborantoj CED povas funkcii. Pri la eldonaĵo "La monda lingvo-problemo" de CED, s-ro F. Simonnet diris, ke li bedaŭrus, se ĝi de-

S-ro Francis E. Helmuth, prezidanto de la usona landa asocio ELNA, invitis partopreni la venontan UK-on en Portland.



vus ĉesi post la garantiita eldona periodo de 4 jaroj, kaj la direktoro de CED respondis, ke tio dependas de la nombro de abonantoj. La esperantistoj petu al bibliotekoj, ĉu universitataj ĉu urbaj, aboni ĝin. Pli da abonantoj ebligas pluan aperadon de la revuo. Post tio petis parolon s-ro G. C. Fighiera el Belgujo. Li faris plurajn rimarkigojn pri la ĝenerala situacio de UEA, proponante i.a. "kodon de etiko" por la instancoj de la Esperanto-movado. Prof-o Lapenna respondis pri diversaj punktoj tuŝitaj de s-ro Fighiera, kaj sekvis iom longa diskuto, kiun punktis s-ro E. L. M. Wensing per alvoko, ke ni forgesu la pasintecon kaj laboru kune por la estonteco.

Provizore kontentigaj rezultoj de la pri-kongresa informado

Vizitis pluraj raportistoj (i.a. eĉ kvar de BBC) la gazetaran konferencon, kiu okazis kadre de la UK por eksteraj radio-televidaj kaj gazetaraj instancoj kun ĉeesto de, el nia flanko, la prezidantoj de UEA, Brita Esperantista Asocio kaj la Loka Kongresa Komitato, la estraranoj de UEA pri informado kaj kongresoj, la direktoro de la Centra Oficejo k.a.

Sekve de la gazetara konferenco kaj la informado antaŭ kaj post ĝi, pluraj radio-stacioj kaj ĵurnaloj raportis pri la 56a UK kaj/aŭ pri la publika programero "Forumo", kiu vekis apartan atenton. El la plej grandaj ĵurnaloj en Britujo raportis pri la Kongreso "The Times" ("Bonveniga etoso ĉe renkontiĝo de diverslingvanoj"), "Morning Star" ("Esperantistoj el la mondo kune en Londono"), "The Daily Telegraph" (plurfoje, pri la urbestra akcepto, Forumo ktp), "Daily Mail" ("Esperanto: ĝi restas viva"), "The Guardian" ("Poliglotoj kunvenas"). Krom tiuj, dekoj da provincaj kaj lokaj gazetoj raportis pri la UK.

Ankaŭ en aliaj landoj aperis artikoloj pri la 56a UK, el kiuj nur malmultaj (ĉefe el Nederlando, Usono) atingis la redakcion ĝis la nuna momento de la redaktado. Franca konata gazeto "Le Figaro" aperigis 2-kolonan artikolon, kun titolo "Seniluziigo ĉe la 56a Kongreso de Esperanto: neniuj ĉino venis", malgraŭ la partopreno de ne-mal multe da personoj el Japanujo kaj Koreujo.

Krom la jam anoncita radio-elsendado dum kaj pri la UK fare de Pola Radio (vd. *Esperanto*, n-ro 787, p. 117), elsendis plurajn programerojn ĉefe intervjuajn la brita radio-stacio "BBC" (servoj enlanda, rumana, afrika, ekstrem-orienta k.a.) kaj la usona radio-stacio "Westinghouse BC".

Dankoj al dankoj — Solena Fermo

Post la unu-semajna internacia manifestacio de la praktikado de la Internacia Lingvo, oni fermis la 56an Universalan Kongreson en "Friends House" (Kvakera Domo).

Laŭ la peto de la prezidanto, la ĉeestantoj omaĝis al la jenaj mortintoj pro iliaj faritaj grandaj laboroj por Esperanto: prof-o Yrjö Väisälä (vd. alipaĝe la nekrologon), s-ino J. C. Isbrucker, f-ino Julie Šupichová kaj aliaj, kiuj forpasis dum la pasinta unu jaro.

Sekvis la raporto de la ĝenerala sekretario pri la laborkunsidoj de la 56a UK, la dankoj de la prezidantoj de UEA kaj de la LKK de la 56a UK al diversaj

Fine venis la kortuŝa momento transdoni la flagon simbole al la reprezentanto de la LKK de la 57a UK en Portlando (Oregono), Usono. La prezidanto de la LKK de la 56a UK, d-ro J. C. Wells, manpremis kun la prezidanto de la LKK de la 57a UK, s-ro Jim Deer. Bonvenigan saluton al la sekvanta 57a UK faris la prezidanto de la usona landa asocio ELNA, s-ro Francis E. Helmuth.

Dum la plejparto de la kongresanoj estis sufiĉe kontentaj pri la tuta aranĝo de la 56a UK, estis ankaŭ kelke da kritikoj: nome, ke en kelkaj kazoj kunvenejoj ne estis sufiĉe grandaj por engluti ĉiujn enirdezirantojn; ke la mapon de Londono oni ricevis nur en la kongresejo, kiam multaj jam estis bezonintaj aĉeti similan en stacidomo tuj post la alveno al Londono. Tiaj problemoj espereble estu iel solveblaj en la estontaj Universalaj Kongresoj. La prezidanto de la LKK de la venontjara UK diris en la Solena Fermo, ke la 57a UK en Usono estos modela kongreso ankaŭ rilate al la kongresejo (Hotelo Hilton).



Ĉu defio al la angla lingvo en la metropol

— Forumo pri lingva komunikado en la nun (La 2a Ĝenerala Kunveno)



La subtitolo 'La pozicio de la grandaj naciaj lingvoj kompare kun la neŭtrala Esperanto kaj perspektivoj por la estonteco' eble resumas pri klare ol la ĉefa titolo 'La problemo de lingva komunikado en la nuntempa mondo' la enhavon de la nova programero 'Forumo' en la Universala Kongreso en Londono. Supre: la reprezentanto de British Council, s-ro M. Macmillan, raportas pri la hodiaŭa pozicio de la angla lingvo. Apud li (de maldekstre): grafo de Lagatinerie (interpretanto), s-ro Wensing (prezidanto), d-ro Wells (interpretanto), prof. Lapenna (enkondukanto) kaj s-ro Thierry (raportanto pri la franca lingvo).

La kulmino de la ĉi-jara Universala Kongreso de Esperanto estis la publika kunveno "Forumo", samtempe la 2a Ĝenerala Kunveno de UEA, kun temo "La problemo de lingva komunikado en la nuntempa mondo — la pozicio de la grandaj naciaj lingvoj kompare kun la neŭtrala Esperanto kaj perspektivoj por la estonteco". Prezidis s-ro E. L. M. Wensing, vicprezidanto de UEA. Sekva interpreto okazis en Esperanto kaj la angla. El la diversaj invititaj gravaj organizaĵoj okupiĝantaj pri disvastigo de nacilingvoj (*British Council*, *Alliance Française*, *Goethe-Institut* kaj la soveta kaj ĉina Akademioj de Sciencoj), aktive partoprenis la Forumon sole la konata "British Council" (Brita Konsilantaro) pere de sia direktoro s-ro M. Macmillan. Kiel observanto ĉeestis reprezentanto de "Goethe-Institut", kiu prezentos poste skriban kontribuon. La granda halo, kie okazis la Forumo, estis plenplena de pli ol mil kongresanoj kaj ne-esperantistaj universitatanoj kaj observantoj de diversaj organizaĵoj, kiuj estis invititaj.

Enkondukan raporton faris prof-o Lapenna, ĉefe pri la nuntempaj tendencoj de la kresko de bezono havi internacian komunikilon en diversaj kampoj (ekz-e en la turisma) kaj pri la kresko de la nombro de naciaj lingvoj uzataj precipe en interŝtataj organizaĵoj.

La "pozicio" de lingvoj

Al tiu enkonduko sekvis s-ro Macmillan kun la plejparte al ni jam konataj argumentoj. Kvankam ne ĉie oni komprenas la anglan — argumentis s-ro Macmillan — la angla estas la dua lingvo en la mondo laŭ la nombro de parolantoj (la unua estas la norma ĉina

Kimra lingvo en EEK?

"La Kimra Naciista Partio deziras, ke la kimra lingvo fariĝu oficiala lingvo en Eŭropa Ekonomia Komunumo.

La Partio skribis al la brita reprezentanto s-ro Geoffrey Rippon pri tio.

S-ro Gwynn Matthews, proparolisto de la Partio rilate al EEK, hieraŭ diris: 'La oficialaj lingvoj de la ŝtatoj-membroj aŭtomate fariĝas oficialaj lingvoj de la Eŭropa Komunumo. La Leĝo pri la Kimra Lingvo en 1967 donis al la kimra lingvo juran validecon egalan kun tiu de la angla lingvo. Tial estas klare, ke la kimra lingvo devas fariĝi oficiala lingvo de la EEK, se aŭ kiam Britujo aliĝos.' "

— el "Daily Mirror", 4 junio 1971

o de la angla? tempa mondo

lingvo) kaj la unua en la mondo laŭ disvastiĝo. La "pozicio" de ĉiu lingvo estas, laŭ s-ro Macmillan, la sumo de ĝiaj funkcioj, ĝiaj uzantoj kaj iliaj sintenoj al ĝi.

"La internacia lingvo Esperantangla, lingvo de internacia nekomprenebleco"

Li klare distingis la norman anglan lingvon disde aliaj nekompreneble parolataj "anglaj" lingvoj kaj agnoskis la fakton, ke en multaj landoj la nivelo de ĝia instruado pli kaj pli malaltiĝas. Kaj finfine la rezulto povus esti apero de "la nova internacia lingvo 'Esperantangla' (Esperanglish), la lingvo de internacia nekomprenebleco, kiu kuregas al kompleta malkomunikado" (el "Economist", 3.1.1970).

Antaŭ la fino de ĉi tiu jarcento — li citis la profetaĵon de Luksemburga Konferenco okazinta pasintjare sub aŭspicio de Instituto de Lingvistoj — ĉiu en Eŭropo eble uzos ian specon de la angla.

"Reala solvo — instrui la anglan" — Macmillan

"Kia ajn estos la pozicio de la angla," — s-ro Macmillan konkludis — "ĝia uzo pli verŝajne dependos de kutimoj kaj oportuneco kaj personaj iniciatoj, ol de oficialaj dekretoj kaj direktivoj distingantaj formale inter laboraj kaj oficialaj lingvoj... Laŭ mia opinio, la plej realisma solvo estas: intensigi lernadon de fremdaj lingvoj. Kiu fremdaj lingvoj? Tiuj lingvoj, por kiuj estas la plej granda evidenta bezono kaj por kies instruado al parolantoj de aliaj lingvoj formiĝis tra la jaroj abunda profesia scipovo akirita el vasta praktika sperto. Mi opinias, ke la angla estas unu tia lingvo."

EEK ne helpas verkistojn

En la brita ĵurnalo *Times* de la 13a de aŭgusto 1971 aperis, sub la titolo "La eŭropa kultura perspektivo: pli da kontaktoj en la belarta mondo apenaŭ espereblaj, ĉar Traktato de Romo ne povas forigi lingvajn barojn", artikolo de Sue Masterman, el kiu ni ĉerpas jenajn alineojn pri la situacio en Nederlando:

"Mi ne havis tempon" — Bernard Shaw

Al tiu argumentado de s-ro Macmillan, humure respondis prof-o Lapenna, rakontante familiare pri siaj spertoj: — spertoj pri lingvolernado en lernejoj; spertoj pri la malfacileco "ellerni" fremdajn lingvojn, citante la vortojn de George Bernard Shaw, "Kial mi ne lernis fremdan lingvon? Mi ne havis tempon, ĉar la tutan vivon mi lernadis la anglan." Li akcentis la pli-kaj-pli komplikiĝantan lingvan situacion en la interpopolaj rilatoj kaj, prenante la ekzemplon de Britujo, kiu transiris al la internacia decimala sistemo de mono, diris, "Kial ne fari la lastan paŝon kaj enkonduki ankaŭ internacian lingvon?"

"Advokato de la diablo" parolas por la franca

S-ro J. Thierry (Francujo), nomante sin "advokato de la diablo", ĉar li parolas kiel franco sed samtempe esperantisto, klarigis la kreskantan pozicion de la franca lingvo kun ciferoj disponigitaj de la franca ministerio por la eksterlandaj aferoj.

D-ro V. Sadler, kiel redaktoro de LMLP, respondis al la argumento de s-ro Macmillan, ke Esperanto ne estas realeca solvo: Moderna propagando kaj reklamado povas tiel influi la publikan sintenon, ke ĝi fariĝos realeca.

S-ro Marius Dastych, reprezentanto de Pola Radio, klarigis la lingvan situacion en Pollando, i.a. ke aŭtoritatoj de Pollando alte taksas kaj subtenas la Internacian Lingvon.

Eĥoj post la Forumo

Detala raporto pri la tuta Forumo aperos en la revuo *La monda lingvo-problemo*.

Kvankam ĝis nun atingis la redakcion nur malmultaj el la aperintaj artikoloj en gazetoj, la meza eĥo antaŭvidebla verŝajne estas sufiĉe favora al la argumentado de prof-o Lapenna; ekz-e, unu el la plej gravaj ĵurnaloj en Britujo "The Times" dediĉis multe pli da spaco al la argumentoj de prof-o Lapenna, ol al tiuj de s-ro Macmillan. Malgraŭ la unusola aktiva reprezentado el la "grandaj" naciaj lingvoj, la frukto de la publika forumo pri lingva komunikado estis neglekteble granda.

"La literaturon, tamen, limigas lingvaj baroj, kiuj bedaŭrinde malebligas al la cetera mondo ĝui unu gravan parton de la vigla kultura vivo de Nederlando. La mondo konas flandrajn artistojn kiel Rembrandt, Jan Steen kaj Van Dyck, sed kiu aŭdis pri Joost van den Vondel, samtempulo de Shakespeare, kies verkoj atingas similan kvaliton? Van Gogh estas monde konata, sed kiu legis la Dickens-ecan, kontraŭ-koloniisman retorikon de Multatuli, el la sama periodo?

La lingvaj baroj estas io, kion la Traktato de Romo neniel povas forigi. Eldonistoj timas la riskojn, kaj tradukistoj el la nederlanda en la anglan estas tre malabundaj. La verkoj de brilaj nuntempaj verkistoj kiel Harry Mulisch, ĉefe influata el Kubo kaj Latin-Ameriko, aŭ Gerard Kornelis van het Reve, kiu gajnis pasintjare la ĉefan nederlandan literaturpremion, neniam atingis britajn legantojn."

NEŬTRALECO

UEA estas neŭtrala rilate al nacieco, raso, religio, politiko kaj sociaj problemoj. UEA deklaras, ke la respekto de la homrajtoj estas por ĝia laboro esenca kondiĉo. Ĝia sinteno estas diktata de la ideaj celoj de la Esperanto-movado. Ĝi rilatas simpatie al ĉiuj movadoj, kiuj sur ne-politika bazo klopodas efektiviĝi ideojn identajn tute aŭ parte kun la celoj de la Asocio.

— "Statuto de UEA", artikolo 4

NEŬTRALE Ĉu la nuna laŭstatuta "DE

La demando pri neŭtraleco jam plurfoje kaŭzis viglajn — kaj spontanajn — debatojn en la historio de la Esperanto-movado. Oni memoras ekzemple la diskutojn pri la sinteno de UEA al faŝismo, tuj post la Dua Monda Milito. Eble pro la fakto mem, ke ĉi-foje temis pri planita Debato, formala kaj ne spontane ekflaminta, la etoso en Londono, malgraŭ la diverseco de opinioj, estis rimarkinde trankvila kaj unueca en siaj konkludoj.

Kadre de la 56a UK oni havis 2-horan ŝancon por debati pri la temo "Neŭtraleco de UEA — ĉu la nuna laŭstatuta koncepto estas adekvata?".

Enkondukis la temon prof-o Lapenna laŭ historia fadeneto. Li konstatis interalie, ke la principo de neŭtraleco estis akceptita en 1908 kaj amendita en 1947, kiam Internacia Esperanto-Ligo kaj Universala Esperanto-Asocio kunfandiĝis; ke jam tiutempe la Estraro diskutis pri la larĝeco de la aplikado de la neŭtraleco en la praktiko; ke okazis tamen diversaj kritikoj, jen ke UEA estas tro neŭtrala, jen ke ĝi estas ne sufiĉe neŭtrala. Al tia enkonduko sekvis jenaj opinioj, kiuj ĉi tie prezentiĝas en tre koncizigita formo.

"UEA estu ne-neŭtrala".

S-roj R. Graetz (G.D.R.) kaj H.F. Bing (Britujo) esprimis opiniojn kontraŭ la principo de neŭtraleco, kiuj ĉefe temis pri la sinteno kontraŭ militoj. H. F. Bing: "UEA ne devas esti neŭtrala rilate al militoj." R. Graetz: "Absoluta neŭtraleco ne ekzistas. Ĉu UEA ne povas ne havi pozicion por ĉesigo de militoj, armado ktp., ekz-e subtenante la porpacan principon de Unuiĝintaj Nacioj eksplicitan en la artikolo 1 de la UN-ĉarto?"

"UEA estas jam ne-neŭtrala".

Kritikis pri "ne-neŭtralaj" facetoj de UEA jenaj personoj: s-ro S. Shenfield (Britujo), "Universalaj Kon-



(Foto: Prelegas prof-o Gim Taekeng el Koreujo)

La 24a sesio de Internacia Somera Universitato okazis en Universitato de Londono, kadre de la 56a UK. En sia enkonduka parolo kiel la rektoro de la 24a sesio, s-ro H. L. Elvin menciis i.a. la lastatempan

rimarkindan internaciigon de la studenta konsisto en Universitato de Londono, estante mem la direktoro de ĝia Instituto de Edukado, el kies studentoj 50% estas eksterlandanoj, kaj tion, ke en la internacia mondo — se racia — ne devus esti bezono de interpretista tasko pro la alprenado de la Internacia Lingvo. Prelegis 11 personoj el 9 landoj: prof-o Ivo Lapenna (Britujo) pri "Marksisma koncepto pri ŝtato kaj juro", prof-o C. J. Adcock (Nov-Zelando) pri "Du aspektoj de lernado", prof-o Olav Reiersøl (Norvegujo) pri "Komenco de la probablokalkulo", d-ro Humphrey Tonkin (Usono) pri "Reĝo Lear kaj universaleco de Shakespeare", gvidprof-o Gim Taekeng (Koreujo) pri "Korea Siĝo-literaturo, la tradicia popolpoemo", prof-o Vasil Peevski (Bulgarujo) pri "Celoj kaj signifo de la nuntempa katastro", d-ro Hans M. Maitzen (F.R.G.) pri "La magnetaj steloj — decidaj objektoj por la teorio de stelevoluo", d-ro J. C. Wells (Britujo) pri "Kio estas ŝanĝi sian prononcon?", prof-o Gaston Waringhien (Francujo) pri "La problemoj de la alfabeto" kaj, pro la malsaniĝo de prof-o M. I. Isaev, kiu estis prezentonta prelegon pri "La lingvaj problemoj en multnacia ŝtato", verkitan kunlabore kun la forpasinta prof-o Bokarev, voĉlegis ĝin prof-o B. N. Kameškov (Soveta Unio).

Oni havis okazon ankaŭ demandi pri la temoj al la koncernaj prelegantoj.

CO DE U.E.A. koncepto estas adekvata? BATO''

greso ne estas neŭtralaj, ĉar ili okazas sub 'altaj protektantoj', kiuj ĝenerale apartenas al iu politika partio"; s-ro L. Åberg (Svedujo), "La vortuzo 'fremdaj popoloj' en la Statuto de UEA (art. 3, b.i) mem ne estas neŭtrala; ĝi devas esti anstataŭigita per 'ĉiuj popoloj'. Akcenti la Deklaracion de Homaj Rajtoj ne estas neŭtrale, dum ne ĉiuj homoj samopiniis pri la homaj rajtoj. Same pri UN mem." Prof-o Lapenna klarigis pri kelkaj punktoj kritikitaj. Nome, i.a. ke tie, kie ni kongresas, ni akceptas tiean konkretan ŝtatestron aŭ urbestron kiel Altan Protektanton kaj, por esti neŭtralaj, ni akceptas iun ajn ŝtatestron; alikaze ne eblas ie kongresi; ke la Statuto de UEA estas jam aĝa dokumento kaj respektis la homajn rajtojn jam en 1908, antaŭ ol UN proklamis la Deklaracion (en 1948).

"UEA restu neŭtrala laŭstatute".

Subtene al la principo de neŭtraleco substrekis ĝin jenaj personoj: s-ro F. Simonnet (Francujo), "Ĉar

UEA volas havi membrojn el ĉiu ajn lando, necesas la principo de neŭtraleco, kun distingo inter neŭtraleco de UEA kaj tiu de individuoj."; s-ro K. E. Salzmann (F.R.G.), "Ni kiel individuoj aktivis ankaŭ en aliaj movadoj ekster UEA."; s-ro G. Drost-Jansen (Nederlando), "Necesas ne diskuti pri politikaj aferoj."; f-ino V. Zlotnikova (Sovetunio), "Interne de UEA ni povas esti neneŭtralaj, sed ekstere devas esti neŭtralaj."

Ĉu malfermi UEA-eldonaĵojn por politikaj aferoj?

Opiniis s-ro U. J. Moritz (F.R.G.), ke oni malfermu la gazetojn de UEA por la publiko kaj ke la statuta neŭtraleco estas ĝusta, sed ĝia apliko estas malvasta. S-ro Carlén klarigis, ke ne eblas aperigi ĉiujn opiniojn politikajn ekz-e en la revuo *Esperanto* kaj ke do necesas aperigi neniun opinion tian. Aldone prof-o Lapenna atentigis pri la lastatempa politika enhavo de *Kontakto*, eldonata de TEJO, akcentante, ke, ĉar UEA havas la principon de neŭtraleco kaj ĉar TEJO estas sekcio kaj integra parto de UEA, ankaŭ la eldonaĵoj de TEJO devas esti neŭtralaj.

Per neŭtraleco UEA vivas

"Nun ekzistas elasta libereco en UEA, sed se UEA akceptus politikan taskon, jam morgaŭ ĝi ne ekzistis." Tiu frazo dirita de la prezidanto de UEA ja povus koncize montri, laŭ kia principo UEA ekzistis kaj restas kaj verŝajne restos.

Aperis raportoj pri tiu Debato en pluraj ĵurnaloj ĉefe en Britujo.

FORPISIS PROF-O VÄISÄLÄ — honora patrono



Prof-o Y. Väisälä

YRJÖ VÄISÄLÄ (1891-1971)

Prof-o Y. Väisälä, membro de Honora Patrona Komitato, mortis en julio 1971 ĵus antaŭ la 56a UK en Londono.

Konata kiel astronomo, li estis membro de la Akademio de Finnlando, direktoro de la Astronomia-Optika Societo en Turku kaj fakdelegito de UEA pri astronomio. Mondfamaj estas liaj kontribuoj en la astronomia medio: pliprecizigo de mezurado de distancoj (interfera metodo per lumradioj); eltrovoj de novaj asteroidoj, el kiuj al du li donis nomojn "Zamenhof" kaj "Esperanto". Li aktivis ankaŭ kiel la prezidanto de Internacia Scienca Asocio Esperantista ĝis la morto.

Aktivu ankaŭ en aliaj movadoj

Skribas Karl Nell (Usono):

La artikolo de prof-o Lapenna pri "Sekteco" en *Esperanto* de junio 1971 (p. 112) priskribas unu tre gravan situacion en nia movado; mi volas nur aldoni, ke ekzistas ankaŭ alia "sekteco", kiun li ne mencias, sed kiu estas — laŭ mia opinio — same malhelpa por la evoluo de la Esperanto-movado, nome, ke granda nombro de niaj Esperanto-aktivuloj laboras nur ene de la Esperanto-movado, ne serĉante kontakton kun aliaj gravaj movadoj.

Ni ja komprenas, ke Esperanto povas kaj devas esti servilo por la plej diversaj celoj, kaj nur kiam ĝi estos rekonita kiel tia servilo, ĝi atingos la ĝeneralan akcepton flanke de la publiko, kion ni deziras kaj kion ĝi meritas.

Do, por ke nia laboro por Esperanto estu fruktdona, estas necese, ke ni aktive kunlaboru samtempe ankaŭ en aliaj movadoj, kie ni gajnu amikecon kaj fidon.

RIĈA PREZENTO DE LA ARTO — Artaj aranĝoj dum la 56a UK

Kvankam ekster la serio de la Internaciaj Artaj Festivaloj, la Londona UK proponis tre varian kaj ampleksan kulturen programon, ĉi-sube koncize recenzatan. . .

Brita Vespero kun skota kaj kimra koloroj

Pompa estis Brita Vespero, kiu okazis en "Royal Festival Hall", la inaŭgurejo de la UK, kie ne mankis por artistoj teknikaj modernaj instalaĵoj. Du miloj da kongresanoj tie komforte sidis antaŭ la spektaklo de Anglujo, Skotlando, Kimrujo kaj Irlando.

Profesia kantistino Sybil Michelow (mezosoprano), kvankam neesperantistino, prezentis 6 kantojn, originale verkitajn en Esperanto de Zamenhof, Boulton kaj Thévenin kaj komponitajn de Frank Merrick, kiu akompanis ŝin pian. Amatora violonisto John Rešek ludis 3 muzikajn erojn de anglaj komponistoj kun piana akompano de David Hill; Nikolaj Rytjkov, rusdevena, prezentis kelkajn Shakespeare-aĵojn en altnivela aktorado. Ses folklorajn kantojn el Anglujo kaj Irlando prezentis mezosoprano Margaret Hill, kiun akompanis ŝia gitara memludo kaj ŝia edzo David Hill pian. Reto Rossetti, prezentanto de la Brita Vespero, amuzis la spektantojn per britaj

anekdotoj (de la tipo internacie komprenebla).

El la kimra kulturo: 5 kimrajn kantojn (2 en Esperanto; 3 en la kimra lingvo) prezentis 37 membroj de Kimra Virvoĉa Ĥoro de Londono, kiuj aldonis ankoraŭ unu kanton responde al la krioj "Bravo!" La fortaj aplaŭdoj verŝajne estis signo ankaŭ de la simpatio al la kimralingva socio, kiu estas malpli-multo en Britujo.

El la skota kulturo: poemon de Robert Burns el la 18a j.c. deklamis William Auld kun majesta tono, ludis plaĉan popolmuzikon Bob Murphy per sakfluto, amuzis la spektantojn per trombono en skota kostumo Maurice Bale kun britaj spicoj, kaj prezentis popoldancojn kolor-riĉe kaj elegante 8 membroj de Reĝa Skota Popoldanca Societo kun sakfluta akompano de Bob Murphy.

Ne gravis, ke inter la prezentintoj troviĝis ne-esperantistoj, sed ja gravis, ke ili propraokule vidis du milojn da spektantoj, komprenantaj Esperanton.

La kuraĝe lanĉita nova ero 'Internacia Vespero de Kanto' surscenigis 12 gekantistojn el 8 landoj.

La elekto ampleksis vastan gamon, de Mozart ĝis Cole Porter, de praaĵ popolkantoj ĝis modernaj originalaĵoj. Skotajn tradiciajn kantojn prezentis Jeannie Weir (foto) kun piana akompano de sia edzo.





Nikolaj Binev kiel la trompata edzo (staranta) akceptas konsilon de la intriganto Ligurio (Stefan Stajčev) en ĉeesto de servisto kaj la kantistino-komentistino, kiu kunligis la scenojn per siaj deklamaĵoj (Renata Kiselička, maldekstre). La komedio de Makiaveli (Macchiavelli, aŭtoro de 'La princo') cinike rakontas la trompiĝon de naiva maljuna edzo helpe de superstiĉo pri la medicinaj efikoj de mandragora radiko. Ĝi estas la sola komedio el la 16-a jarcento, kiun ankoraŭ konservas en siaj repertuaroj la nuntempaj grandaj teatroj.

Teatra Prezento amuzis plenaĝulojn

Ĉi-jare prezentiĝis nur unu teatraĵo, ludita de Bulgara Esperanta Teatro, nome komedio "Mandragoro" de Nikolo Makiaveli (1469-1527), tradukita de Kiril Draĵev el la itala originalo. Aktoris 10 rolantoj sub reĝisorado de prof-o Krâstju Mirski kaj gvidado de Draĵev.

Dum estis kritiko pri la elektita dramo "nedeca", f-ino Marjorie Boulton (Britujo, verkistino) recenzis: "Estas neeble elekti dramon, kiu plaĉos al ĉiuj kongresanoj, sed *Mandragoro* havas kelkajn meritojn por UK: la relative simplan facile kompreneblan humuron de iom primitiva komedio; intrigon rapidan kaj eventoplenan; amuzajn karakterojn..." En la senco amuzi la spektantojn, "Mandragoro" verŝajne sukcesis kaj supozeble ne celis pli ol tion.

Kultura Vesperto, el Bulgarujo kaj Pollando

En Kolegia Teatro okazis Kultura Vesperto. El Bulgara Esperanta Teatro 2 geaktoroj, t.e. Anani Anev kaj Belka Beleva, rolis respektive s-ron Bernard Shaw

kaj s-inon P. Cambell, kiuj reale ekzistis. La teatraĵo "Kara mensoganto" estas bazita sur leteroj de ambaŭ geamantoj; la aŭtoro estas Jerome Kilty. Aldoniĝis al la monotona legado de leteroj sonefektoj per laŭtparolilo.

El Pollando Andrzej Tomecki, kanzonisto-aktoro, prezentis la jam konatan spektaklon "Kaj tamen estas Varsovio". Mirinde bonaj estis la sonefektoj kaj lumefektoj, por kiuj komunspire kunlaboris lia edzino. Interparolo de Tomecki kun surbendaj voĉoj de diversaj homoj, sufiĉa moviĝo dum la kantado, ĉio ĉi estis teknike perfekta.

Pri tiu Vesperto recenzis konata aktoro Nikolaj Rytjkov: "Tia glorigo de Varsovio kun naciisma kromgusto nekonvenas al la internacia karaktero de UK. Dum tiu prezento estis teknike perfekta, ne eblas ne rekonii, ke estis kontrasto, nome ke la bulgaraj geaktoroj prezentis kongreslandaĵon, dum la polo glorigis sialandaĵojn."

Internacia Vesperto de Kanto

Estis du partoj de la kanta vesperto. En la unua prezentiĝis klasikaj kantoj; kaj en la dua, modernaj kanzonoj.

Kantis klasikaĵojn: Charlotte Hube, Maria Prinz kaj Karl Grabner (Aŭstrujo); Maria Angelova (Bulgarujo); Miroslav Smyčka (Ĉeĥoslovakujo); Sirkka Lehtivaara (Finnlando). Akompanis piano.

Modernajn kanzonojn prezentis: Jeannie Weir (Britujo); Mišo Zdravev (Bulgarujo); Mario Mazzoli (Italujo); Ramona van Dalsem (Nederlando); Andrzej Tomecki (Pollando). Akompanis ilin elektronika orgeno, gitaro, basgitaro, tamburado, escepte ke Tomecki kantis kun akompano de surbenda muziko.

Pri tiu unua provo de la kanta vesperto recenzas Jo Haazen, urba kariljonisto de Antverpeno: "La pianisto-akompananto G. Pratley (prof-o de Reĝa Akademio de Muziko) faris bonegan laboron. Entute estis tre interese aŭdi tiom da diversaj voĉoj, stiloj kaj eblecoj. Nur bedaŭrinde, ke la diferenco inter profesiuloj kaj neprofesiuloj estis kelkfoje bone konstatebla. La orkestreto faris sian eblon, tamen ĝi bezonas pli da sango por esti plene ĝuebla. Espereble sekvas la unuan provon aliaj kantvesperoj, kiuj daŭre pliperfektigu, ĝis kiam estos akirita nivelo inda por esti komparata kun konataj realigoj ĉiulandaj."

Plenplena Salono de film-prezentado

La salono de la film-prezentado estis tiel plena de homoj, ke oni devis prezenti la samajn filmojn en la posta vesperto.

La plej impresa el la 5 filmoj prezentitaj — ĉiuj koloraj — estis onidire "Bonvenon al Oslo", kiu estas teknike kaj enhave bone aranĝita. La plej nova filmo de la itala aŭtomobila firmao Fiat — kiu donacis al ĉiuj kongresanoj belan tekono — kun titolo "Renkonto kun Fiat" estis verŝajne plaĉa al ĉiuj.

"La 55a UK en Vieno 1970", duonhora dokumenta filmo de UEA, laŭ teknika vidpunkto ne estis "bonfama" inter la spektantoj. La aliaj prezentitaj filmoj estis: "Ĉi tiu lando Aŭstralio" (20-minuta) kaj la filmo pri la samtempa geedziĝo de du paroj esperantistaj.

DEKOJ DA FAKAJ KUNVENOJ

dum la kongresa semajno

Dekoj da fakaj organizaĵoj kunvenis dum la 56a UK. Pro spacmanko, ni povas menciigi nur, ke okazis, en la kadro de la fakaj kunvenoj, diskutoj, raportoj, elektoj, prelegoj, vizitoj al la koncernaj lokoj ktp. Kunvenis la jenaj fakoj (interkrampaj ciferoj montras la nombrojn de la partoprenintoj), krom la kunvenoj de instancoj Akademio de Esperanto (nepublika; 10 akademianoj el 5 landoj), Informaj Fakoj, Institucio Hodler '68 kaj Komisiono por Agado en Eŭropo:

El la profesia kaj profesieca kategorio — sciencista (64 pers. el 19 landoj), jurista (50 pers. el 15 landoj), ĵurnalista (23 pers. el 13 landoj), medicinista (24 pers.), fervojista (25 pers. el 8 landoj), poŝtista-telekomunikista, instruista (45 pers. el 15 landoj), filologa (25 pers. el 16 landoj), aŭtomobilista (45 pers. el 15 landoj), filatelista (25 pers.), radioamatora (17 pers. el 9 landoj), foto-kino-magnetofon-amatora, bibliista-orientalista (77 pers. el 12 landoj).

El la religia kategorio — interreligia kunveno (80 pers. el 20 landoj), kiun ĉeestis la reprezentantoj de Martinus-Instituto, Mondomesianismo, Islamo, Liberpensuloj, Blanka Frataro, Kvakerismo, Novrevelacio, Katolikismo, Kristanismo, Oomoto, Judismo; kristana (84 pers. el 19 landoj; al la diservo 400 pers. el 30 landoj), katolika (51 pers. el 20 landoj; al la meso 254 pers.), ekumena, spiritista (140 pers.), islama (diservo en londona moskeo); oomota (60 pers. el 15 landoj).

Okazis ankaŭ la kunvenoj mondpacista (130 pers. el 21 landoj), militrezistista (50 pers. el 18 landoj), mensa (8 pers. el 3 landoj), turisma (ĉ. 60 pers.), vegetarana (22 pers. el 14 landoj).

TEJO havis, krom laborkunsidoj, publikan kunvenon (230 pers.) k.a., pri kiuj oni povos legi en la TEJO-paĝo en la venonta numero. Okazis krome kunvenoj studenta (21 pers. el 10 landoj), skolta (38 pers. el 14 landoj), veterana (22 pers. el 10 landoj) kaj de Esperanto Programita (90 pers. el 19 landoj).

39a blindula kongreso

Kadre de la 56a UK, paralele kun ĝi okazis la 39a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj dum 1 semajno. Ĉeestis ĝin centoj da nevidantoj kaj iliaj helpantoj. La kongreso okazis en la studenta hejmo *Ifor Evans Hall*, kiu estis samtempe ilia loĝejo. Inter la programeroj troviĝis, krom la ĝeneralaj kunvenoj, prelegoj, diskutadoj, ekskurso, distra vespero k.a.

KONGRESETIS 75 IN — Kunlaboris 16 gegvi

En marborda vilaĝo de suda Britujo, St. Mary's Bay (New Romney), apud Folkestone la 12a Infana Kongreseto okazis de la 30a de julio ĝis la 6a de aŭgusto 1971 kun partopreno de 75 geinfanoj el 14 landoj, nome Aŭstrujo (1), Belgujo (4), Britujo (28), Bulgarujo (1), Francujo (22), F.R.Germanujo (3), Hispanujo (1), Hungarujo (1), Italujo (3), Japanujo (1), Nederlando (1), Norvegujo (2), Svedujo (5) kaj Usono (2).

La ĉefgvidanto estis s-ro Raif Markarian (Britujo), sub kiu harmonie kunlaboris la internacia gvidantaro de 15 membroj el 7 landoj. Ĉiu gvidanto havis malgrandan internacian grupon de 5-8 infanoj.

Dum la kongresa semajno okazis interalie vizitoj al la Inaŭguro de la 56a UK kaj al turismaj lokoj, ekskursetoj, ludoj, krom la kutima akcepto (per koncerto) por vizitantoj el la 56a UK.

Pri la lingva nivelo de la infanoj, la ĉefgvidanto raportas, ke kelkaj infanoj vere ne posedis la necesan minimuman scion por kompreni simplajn instrukciojn, kaj estas dezirinde — laŭ li — ke UEA plue insistu pri ia atesto de la lingvo-scio de la partoprenontaj infanoj. Kaj li konklude diras: "Evident-



Esence elokventa estas la virino...?

Ĉi-jara gajninto de la 1a premio de la Oratora Konkurso estis s-ino Iva Åberg...

FANOJ EL 14 LANDOJ dantoj

iĝis, ke devos okazi apartaj renkontiĝoj por infanoj kun nesufiĉa lingva kono. Por ili pli taŭgas semajna aŭ dusemajna kurso de Esperanto kun lecionoj."

S-ro Markarian, estante la prezidanto de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), atentigas, ke ILEI nunmomente esploras la eblecojn organizi tiajn kursojn en diversaj lokoj."

Rilate al la denaskaj esperantlingvanetoj, li raportas, ke ili mirinde efikis por paroligi eĉ pli aĝajn infanojn kun ne sufiĉa lingva kono; eĉ angla knabo ne povas 'krokodili' kun hungara knabo, kiu scipovas nur Esperanton kaj la hungaran lingvon.

"Kiel ĉiam, la ĉefa valoro de la kongreseto estis la facila interkompreniĝo inter infanoj el diversaj landoj," — tiel ja konkludis la ĉefgvidanto, kaj lige kun la kongresejo, kie estis ankaŭ ne-esperantista granda grupo de 800 membroj, aldonis — "Tion tuj rimarkis la neesperantistoj. Kaj niaj gvidantoj kaj infanoj devis respondi al multaj demandoj. La posedantoj kaj oficistoj de la kongresejo montris grandan interesiĝon kaj faris multon por certigi al ni ĝuindan restadon."



ORATORA KONKURSO: REZULTOJ

1. Iva Åberg (Svedujo); Pokalo Ivo Lapenna.
2. Jo Haazen (Belgujo).

Konkursis nur 4 personoj. La du premiitoj gajnis premiojn ankaŭ pasintjare; s-ro Haazen, la duan, kaj s-ino Åberg, la trian. Malgraŭ la peto al la Landaj Asocioj instigi junulojn al la Oratora Konkurso, denove malmultaj anoncis sin.

La juĝantaro konsistis el 3 personoj (Roger Bernard, Francujo; Ivo Osibov, Jugoslavio; Humphrey Tonkin, Usono).

ghetti. Adan Hryniewicz (= "Ergoto de Bon-aero", Argentino): "Kristnaska kanto" de Juan del Encina.

Originala prozo

Premioj nealjuĝitaj.

Originala dramo

Premioj nealjuĝitaj.

Laŭda mencio: Nevena Nedelĉeva (Bulgarujo); "Jubileo".

Nova talento (Pokalo Harabaĝiu)

Kenneth G. Linton (Aŭstralio), pro traduko de la poemo "La vojrabistoj" de Alfred Noyes.

BELARTAJ KONKURSOJ: REZULTOJ

Originala poezio (36 konkursaĵoj)

1. Nealjuĝita.
2. E.V. Tvarožek (Ĉeĥoslovakujo): "Al la vento".
3. Miyamoto Masao (Japanujo): "Sarmiento el la vivo".


Tradukita poezio (28 konkursaĵoj)

1. G. Pisoni (Italujo): "Piano dum la nokto" de Salvatore di Giacomo.
2. - en egaleco -
Julius Balbin (Usono): "Mi atendas" de L. Ferli-

Venis 87 konkursaĵoj fare de 44 aŭtoroj el 19 landoj. Prijuĝis ilin la membroj de la prijuĝa komisiono: (por poezio) s-ino C. Conterno, s-roj W. Auld kaj I. Rotkvić; (por prozo) s-roj R. Bernard, J.H. Rosbach, A. Venture; krome la prezidanto de la komisiono prof-o G. Waringhien.

La raporto de la sekretariino de la Belartaj Konkursoj, s-ino E. Lapenna, rimarkigas pri la malmulteco de la premioj sed emfazas, ke tamen la meza nivelo de la konkursaĵoj — premiitaj kaj nepremiitaj — estis kontentiga kiel kutime. Mankas nur brilaj sukcesoj, kaj postrestas la originala kreado precipe en prozo. La kunvenon de Belartaj Konkursoj prezidis R. Bernard.

Enkonduko naturscienca



Recenzas Adrian Boldan (Rumanujo):

Estiĝo de la tero kaj de la homo, de Leander Tell. La Laguna: Régulo, 1971. Beletraj Kajeroj, 38. 124p. Ilus. 19cm.

Daŭrigo de *La bela subtera mondo*, la libro, originale verkita en Esperanto, celas instigi la leganton al ekinteresiĝo solvi la demandon pri lia propra origino. En *Estiĝo de la tero kaj de la homo*, la plej fama sveda amatora speleologo, Leander Tell, dividas la problemon en du gravajn partojn, laŭ la titolo. La unua prezentas faktojn, ĝenerale konatajn al ni el la lernojaroj, tamen allogajn pro tio, ke, ĉar prezentataj de speleologo, ili montras al ni novan, tre interesan vizaĝon. La astronomiaj hipotezoj pri la origino de la sunsistemo estas klare prezentataj, kun siaj kvalitoj kaj mankoj. La erudiciaj konoj de la aŭtoro tuŝas la geologion, astronomion, sismologion, atoman fizikon kaj eĉ la Biblion. En la dua parto, nepre pli interesa, denove aperas jam konataj faktoj kaj konkludoj. Sed tio ne malhelpas nin aŭde legi la tutan libron kaj sekvi la logikecon de la argumentoj. La libro provas respondi al la en la titolo metitaj problemoj, sed fine ĝi starigas unu novan, plej homecan demandon: "Gigantaj mamutoj, danĝeraj praleonoj, prarinoĉeroj, ursegoj, aproj ktp. konkuris la terajn vivkondiĉojn ĉiam kun li" (la homo), "Tiu malgranda, malforta dupiedulo, sed li kuraĝe ĉion venkis. La grava demando nun estas: Ĉu li ankaŭ estos kapabla eviti la mortigajn katastrofojn, kiujn li mem elpensis?" Lingve tre korekta, la libro denove provas per tio, kiel ankaŭ per sia enhavo, la kvalitojn de la "Stafeto" kaj de ĝia eldonisto J. Régulo-Pérez.

Mendu ĉe UEA: 7,20 gld. (por Nederlando 7,49 gld.) + sendokostoj 10%.

Ĉarma bildolibreto

Recenzas M. H. Vermaas (Nederlando):

Jen Londono! de John Lewesdon. Trad. J. C. Wells. Ilus. John Berry. Loughborough (Britujo): Wills & Hepworth Ltd., 1971. 50 p. 18 cm.

La libreto gvidas la leganton tra la centro de Londono kun palacoj, preĝejoj, monumentoj, placoj, muzeoj. Ĝi priskribas tradiciajn solenaĵojn konservatajn tra jarcentoj, klarigas la signifon de monumentoj kaj konstruaĵoj, skizas la enhavon de muzeoj, mencias vidindaĵojn apud Tamizo, rekomendas allogajn parkojn, kie oni povas fuĝi de la urbega bruoj.

Tre utila eldonaĵo ĝuste antaŭ la 56-a UK. En bela klara lingvo ĝi donas taŭgajn informojn al la turisto. Laŭaspekte, ĉarma bone bindita libreto kun 24 plenpaĝaj kolorbildoj nmodernaj sed ne malbone agordiĝantaj kun la enhavo de tradicioj kaj historio.

Mendu ĉe UEA: 1,74 gld. (por Nederlando 1,81 gld.) + sendokostoj 10%.

Ĉiameco de la homaj sentoj

Recenzas Paul Lobut (Francujo):

El Manjoo, japana antikva utaaro. Kompiltradukis Miyamoto masao. Kioto: L'Omnibuso. 1971. 110 p. Ofset. 18 cm.

Komence de la 9a jarcento aperis la unua japana poezia antologio, konsistanta el pli ol kvarmil pecoj en 20 volumoj. En tia amaso, pro sia nebula praeco kelkfoje malfacile interpretebla aŭ miskopiita, speguliĝas la tuta vivo de la tiama Japanujo; el ĉiuj sociaj tavoloj la verkintoj ĉiuokaze esprimis, precipe per tankaĵoj, sian korintimecon. En 1958 aperis 505 elektitaj poemoj el tiu antologio, tradukitaj de K. Ossaka, kies prozodion kritikis la aŭtoro de tiu ĉi nova elekto, farita laŭ la kvalito de 339 variaj pecoj kaj ties tradukeblo; ili eligas eksterordinaran freŝon kaj montras per delikataj animstatoj la ĉiamecon de la homaj sentoj. La libroteknika prezento estas tiu de la kajeroj lastjaraj de la "Hajkista Klubo", kaj certas, ke tiu multezorga prilaboro de Miyamoto masao trovos favoran akcepton de niaj multaj poeziamantoj.

Mendu ĉe UEA: 3,60 gld. (por Nederlando 3,75 gld.) + sendokostoj 10%.

Nova vojaĝrakonto de Tibor Sekelj

Recenzas José Mário Marques (Brazilo):

Tra lando de indianoj, de Tibor Sekelj. El la hispana trad. Ernesto Sonnenfeld. Reviziis la aŭtoro. Malmö: Eldona Societo Esperanto, 1970. 186 p. 20 cm.

Mato Grosso kaj Goiás estas du internlandaj ŝtatoj de la centr(-okcident)-a regiono de Brazilo. La nordan parton de tiu regiono kovras virga arbaro, kiu etendiĝas de Amazonio ĝis tie. En tiu tropika arbaro troviĝas centmiloj da indianoj, ankoraŭ vivantaj en la ŝtona epoko.

La aŭtoro organizis ekspedicion al tiu ankoraŭ ne-esplorita regiono kaj rakontas siajn travivaĵojn kun ĝiaj flaŭro, faŭno kaj la indianoj (karaĵa-oj kaj ĵavae-oj), kies lingvon li eklernis, antaŭ ol alveni al iliaj vilaĝoj, kie li loĝis kelkan tempon.

Iom ĝenas la manko de akompana mapo, kiu klarigus kelkajn detalojn netroveblajn en simplaj atlasoj. En eventuala dua eldono estas konsilinde aldoni kelkajn el la fotoj faritaj dum la ekspedicio. Tio igos la libron duoble interesa.

Mendu ĉe UEA: 23,40 gld. (por Nederlando 24,40 gld.) + sendokostoj 10%.



S-ro Nguyen Van Kinh, antaŭe ambasadoro en Moskvo, (meze) dum la vizito al Ĉeĥoslovakujo. Je lia dekstra flanko: la ĝen. sekretario de MEM, s-ro T. Balda. (Vidu Persone.)

LOKE

Azio

- Okazis de la 29a de aprilo ĝis la 5a de majo 1971 Japana-Korea Esperanto-Renkontiĝo en Koreujo. Krom la publikaj prelegoj, ekskursoj, vizitoj al edukistaj kaj ĵurnalistaj instancoj, estis 30-minuta televida programo, al kiu kontribuis 4 japanaj kaj 3 koreaj esperantistoj.

Belgujo

- Unu el la plej gravaj semajngazetoj "De Post" aperigis 4-paĝan artikolon "Liaj sonoriloj parolas Esperanton" pri intervjuo kun s-ro Jo Haazen, urba kariljonisto kaj fakdelegito de UEA pri muziko.

Brazilo

- En la pasinta julio okazis la 6a Seminario en urbo Campos. Kolektiĝis pli ol 300 esperantistoj el ĉiuj partoj de la lando. Raportis pri la Seminario i.a. unu el la plej grandaj ĵurnaloj en Brazilo *Jornal do Brasil* dediĉis 1 paĝon kun Esperanta titolo "Esperanto estas la solvo en la tempo de la komunikado".

Britujo

- La junulara sekcio de la Asocio por Unuiĝintaj Nacioj kaj la Londona Esperanto-Klubo kune aranĝis publikan prelegon de prof-o Ivo Lapenna pri "La lingvo-demando en Unuiĝintaj Nacioj". Ĉeestis ĝin proksimume 70 personoj.

F.R. Germanujo

- La sekretariato de la Konstanta Konferenco de la Kulturministroj de F.R. Germanujo sendis al ĉiuj federaciaj kulturministroj la memorandon pri la Esperanto-instruado, kiun lastatempe transdonis la Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj.

Grekujo

- En majo okazis serio da pri-Esperantaj prelegoj fare de s-ro Ioanis Kotitsas, direktoro de la Greka Pedagogia Akademio, per la Radio de Tesaloniko.

Rumanujo

- Antaŭ nelonge organiziĝis la tutlanda Rumana Kunordiga Esperanto-Komitato. Post ĝia fondiĝo vigliĝis diversloke Esperanto-rondoj kaj -kursoj.

Rumana Televido elsendis 5-minutan programon "Kio estas Esperanto?" en januaro 1971.

FAKE

Aŭtomobilistoj

- La Internacia Esperanto-Klubo Aŭtomobilista fondis sian Gazetaran Servon por regula informado al la aŭtomobilistaj revuoj en diversaj landoj pri la celoj kaj atingoj de la Internacia Lingvo. Jam la organo de Aŭto-Klubo Itala *L'automobile* (eldonnumero 900 000) favore publikigis informojn de la Servo.

Ekspozicio

- La kultura fako de la urbo Santa Colomba de Gramanet en Hispanujo okazigos en decembro 1971 ekspozicion de desegnaĵoj fare de infanoj el la tuta mondo. La urbodomo atendas la internacian kunlaboron per Esperanto. Oni sendu la desegnaĵojn indikante nomon, adreson kaj aĝon, al: Esperanto-Ekspozicio, Ayuntamiento de Santa Colomba de Gramanet (Barcelona), Hispanujo.

Pupteatro

- La ĉijara Pupteatra Internacia Festivalo, okazonta de la 2a ĝis la 9a de oktobro en tri urboj en Jugoslavio (Zagreb, Sisak kaj Varaždín) antaŭ 15 000 infanoj ĝis 14-jaraj, enhavos 7 esperantlingvajn spektaklojn el 6 landoj. Ĝia organiza komitato (adreso: 41000 Zagreb, Amruševa 5/1) deziras, ke esperantistaj gepatroj vizitu la Festivalon kun la infanoj, kaj geinstruistoj kun grupoj da lerneaj geknaboj, kiujn lastajn la organiza komitato povus oficiale inviti surbaze de interlerneja interŝanĝo kaj loĝigi ĉe zagreбай infanoj.

Teatro

- En teatro Absidole en Parizo (strato: 5 Frédéric Sauton), esperantlingva teatraĵo "La reto", originale verkita de Burkar, estos unuafoje ludita en la 16a de novembro 1971. La prezentado okazos je la 19a horo, de tiu tago ĉiuvespere ĝis la 5a de decembro.

PERSONE

Harry

- S-ro Ralph Harry, konata aŭstralia diplomato fariĝis la nova ambasadoro de Aŭstralio en Bonn, F.R. Germanujo, meze de aŭgusto 1971. La ambasado volonte disponigas sonbendojn kun parolado de ambasadoro Harry en Esperanto, speciale al radiostacioj por Esperanto-programo.

Nguyen Van Kinh

- Nguyen Van Kinh, prezidanto de Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio, partoprenis lastatempe la 14an kongreson de Komunista Partio de Ĉeĥoslovakujo, kiun ĉeestis ankaŭ la delegacio de Ĉeĥa Esperanto-Asocio kaj Ĉeĥoslovakia Esperanto-Federacio. Krom ilia renkontiĝo inter si, okazis intervjuo kun s-ro Nguyen Van Kinh por ĉeĥa ĵurnalo *Práce* (eldonkvanto: 350 000 ekz-roj) fare de s-ro Oldřich Kníchal, ĝia ĵurnalistoj kaj esperantisto.

Pompilio

- En junio s-ro Glauco Pompilio, la antaŭa Konstanta Kongresa Sekretario, vizitis la prezidanton kaj la Centran Oficejon de UEA, survoje de vizitoj al diversaj landoj en Eŭropo pro sia ofico en Japanujo.

Ĉu 100 x 100 egalas al 10 000?

Stranga demando, ĉu ne?

Sur paĝo 139 de la juli-aŭgusta numero vi povis legi, ke "Kampanjo 100 x 100" jam atingis 34 x 100. (Espereble sur alia paĝo de ĉi-tiu numero vi povas legi pri pliaj.)

Fakte estas malagrabla ĉiam denove skribi pri mono kaj peti monon. Nur la cirkonstancoj devigas al tiu farado.

Kiel la prezidanto en la ĉefartikolo de la numero de decembro klare priskribis: la buĝeto de UEA por la jaro 1971 estis en ekvilibro. Nur subite en aŭtuno 1970 la nederlanda poŝto decidis plialtigi la tarifojn de afranko ekde la 1a de februaro 1971 per prok-e 30%, kaj tio kostas al UEA prok-e 10 000,— gld. Temas pri afrankoj de revuoj, jarlibroj, presaĵoj, leteroj ktp.

Kion fari? 10 000,— gld. estas egalaj al prok-e po unu kaj duona gld. por ĉiu individua membro. Ĉu

do proponi ioman plialtigon de la kotizoj? La estraro decidis ne fari tian proponon. Ĝi esperis kaj ankoraŭ esperas, ke 100 membroj, kiuj estas finance en iom bona situacio, helpos plenigi la truon de 10 000,— gld. en la buĝeto, donacante ĉiujare dum tri jaroj ekde 1971 la sumon de 100 gld. aldone al la ordinare pagataj kotizoj kaj kontribuoj. Por iom pli ol unu triono tio ĝis nun sukcesis.

Ĉu vi, kiu legas ĉi tion, kapablas kaj pretas ankaŭ donaci 100,— gld. el viaj enspezoj aŭ el via kapitalo, por tiel forigi la neatenditan fendon inter en- kaj elspezoj?

Multan dankon al tiuj, kiuj jam aliĝis en la agado 100 x 100, kaj antaŭdankon al vi, kiu pretos agi same.

E. J. Woessink,
estrarano pri financoj

Laste aperis. . .

Plej rimarkitaj inter la dumkongresaj aperintaĵoj estis la dika, multkolora *Poŝatlaso de la mondo*, eldonita en Prago, kaj, same tutmonda laŭ enhavo, la *Internacia Kuir-Libro*, kompilita de J. Shorter-Eyck kaj eldonita de BEA en Londono (193 p.). El la sama kampo de nefikciaj verkoj necesas mencii la jam reklamitajn *Senĝenajn dialogojn*, ĝeneralan popularsciencan libron de Alberto Fernández, eldonitan de Stafeto, kaj ĵus aperintan duan verkon de prof. S. Hori (Japanujo), *La vojaĝoj al la sudaj insuloj*, kiu estas kvazaŭ taglibro de biologo, kvankam kun kelkaj politikaj aludoj, (64 p.) Pola E-Asocio eldonis en modesta formo ankoraŭ unu kemian terminaron de Jan Pióro: *Neorganikaj kaj organikaj kombinaĵoj*.

Pri *Vole ... Novele*, elektitaj noveloj de Raymond Schwartz, tuj aperas recenzo. La sola alia beletraĵo nova estas multobligita poemaro *Miozoto* de la estonino Benita Kärt.

Krom la 43-paĝa *Budhisma katekismo* de bikŝuo Subhadro kaj la kajero *Dokumentoj el Romo, 7*, de la Internacia Katolika Informejo, aperis ankaŭ disko kun religia enhavo: *Margit Hakansson-Frisell kantas akompanata de Jörgen Sandblom* (4 himnoj, 45 t/m). Nova eldono de *Perpoema vortaro Esperanto-japana* de O. Deguĉi (450 p.) bedaŭrinde ne estas uzebla internacie.

Ĉiujn mendojn adresu al: Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam 3002, Nederlando. Ĉe novaj eldonaĵoj ne ĉiam eblas tuj indiki la prezon en guldenoj. Al la netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4% kaj al tiuj de diskoj k.a. 14% pro la enlanda imposto. Al ĉiuj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj.



Elegantan kovrilon prenis la regule aperanta astronomia revuo kun aktualaj novaĵoj i.a. pri kosmoveturado.

ESPERANTO EN RADIO

Informojn pri radio sendu al s-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, F-75-Paris (16e), Francujo. Por aliaj detaloj vidu la aprilan eldonon.

RADIO ROMA nun uzas la jenajn ondlongojn: 41.24 m (4275 kcs), 30.90 m (9710 kcs), 25.42 m (11800 kcs). Tago kaj horo restas la samaj.

SVISA RADIO. La ondlongo 75.28 m (3985 kcs) ne plu estas uzata por la tagmeza programo. La ondlongo 31.28 m (9590 kcs) estas anstataŭata de 19.44 m (15430 kcs) por la vespera programo. Tagoj, horoj kaj aliaj ondlongoj ne ŝanĝiĝis.

POLA RADIO. 1) ĉiutaga elsendo: neniuj ŝanĝoj pri la matena programo; la posttagmeza programo estas dissendata per ondoj 41.18 m (7285 kcs) kaj 31.45 m (9540 kcs). 2) "anguletoj" dum nacilingvaj programoj: dana programo inter 20.00h kaj 20.30h per ondoj 49 m, 41 m, dimanĉe; sveda programo inter 16.00h kaj 16.30h per ondoj 200 m (1502 kcs), 49 m, marde; germana programo inter 12.00h kaj 12.30h per ondoj 200 m (1502 kcs), 49 m, 41 m, ĉiutage escepte de mardoj, dimanĉoj kaj feriotagoj.

IOM PRI LA ESPERANTO-MOVADO

La neŭtrala Esperanto-movado estas organizita en *tutmonda* asocio, kiu portas la nomon Universala Esperanto-Asocio, aŭ, mallonge kaj simple: UEA.

En sia nuna formo, UEA estis fondita je la 28-a de aprilo 1947. Sed, jam antaŭ tiu dato du aliaj internaciaj organizaĵoj de esperantistoj ekzistis. Unu el ili nomiĝis ankaŭ UEA, kaj ĝi jam ekzistis *ekde* la jaro 1908. La alia, nomita Internacia Esperanto-Ligo, estis fondita en la jaro 1936. La *tiamaj* gvidantoj de la movado tre deziris, ke ekzistu unueco sur la kampo de internacia agado. Tial ili decidis kunfandi la du organizaĵojn en unu *fortan internacian asocion*. Kaj tiel *ekestis* la nuna Universala Esperanto-Asocio.

Tre multaj landaj asocioj de esperantistoj *aliĝis* al UEA. Por esti membro, la Landa Asocio (LA) devas havi minimume 25 membrojn. Krom tio, ĝi devas esti neŭtrala. Tio signifas, ke la asocio ne rajtas fari diferencojn pri raso, nacio, religio, politiko kaj sociaj problemoj. Kompreneble tiu neŭtraleco ne signifas, ke la esperantistoj, kiuj estas membroj de la Landa Asocio, ne rajtus havi siajn proprajn kaj personajn opiniojn pri politikaj sistemoj, pri religio aŭ pri sociaj problemoj. Nur temas pri tio, ke la Landa Asocio ne faru diskriminacion, *alivorte* ke ĝi ne publike kaj *malkaŝe* kritiku aŭ kondamnu politikajn opiniojn, reĝimojn, religiojn aŭ sociajn cirkonstancojn, kiuj estas kontraŭaj al la propraj.

Klarigoj

tut-mond-a: kio ampleksas la tutan mondon. "Tutmonda asocio" do estas asocio, kiu estas aktiva en la tuta mondo.

ek-de: indikas la komencon, la starto-punkton.

tiam-aj: adjektivo, farita el la vorto (korelativo) "tiam". La *tiamaj* gvidantoj do estas "la gvidantoj de tiam, de tiu tempo".

fortan internacian asocion: Vi atentu la akuzativan *n*. En Esperanto la akuzativo servas ne nur por marki la rektan objekton de la verbo, sed ankaŭ por indiki direkton, movon ktp. En nia ekzemplo oni volas diri, ke la du organizaĵoj estis kune metitaj (movitaj) en unu novan asocion.

ek-est-is: komencis esti, komencis ekzisti.

al-iĝ-is: fariĝis membro. Rimarku, ke oni ĉiam ripetas la vorteton (prepozicion) *al*, do *aliĝi al* klubo, *aliĝi al* kongreso, ĉiu homo povas *aliĝi al* la Esperanto-movado, ktp.

ali-vort-e: diri ion per aliaj vortoj. Tiuj adverbaj formoj estas ofte uzataj en Esperanto. Ekzemploj: alimaniere (laŭ alia maniero), aliflanke (je la alia flanko), alisence (en alia senco) ktp.

mal-kaŝ-e: sen kaŝi ion ajn, honeste, ne volante pri-silenti ion. (Malkaŝe mi diris mian opinion.)

SKRIBI BONAN LETERON ESTAS ARTO

Ne estas facile skribi bonan leteron, nek en via propra lingvo, nek en Esperanto. Antaŭ ol komenci, pripensu bone, kion vi volas sciigi al via korespondanto. Farinte tion, vi povas ĝenerale sekvi jenan gvid-linion:

1. La enkonduko (menciu la daton de la letero, al kiu vi respondas aŭ citu la anoncon, kiu instigis vin skribi, kaj nomu la gazeton, en kiu vi legis

ĝin. Prezentu vin mem al via korespondant/in/o, se vi skribas laŭ propra iniciato).

2. La temo, pri kiu vi volas skribi.

3. La fino (kun viaj salutoj, bondeziroj kaj, eventuale, via peto pri baldaŭa respondo).

Se vi skribas per plumo (neniam per krajono!), skribu legeble kaj tre klare, ĉar la manskribo de unu persono povas esti tute alia, ol tiu de alia persono. Krom tio, multaj popoloj ne kutimas legi kaj skribi la latinan alfabeton (ekzemple rusoj, ĉinoj, japanoj, araboj, hebreoj, irananoj kaj pluraj aliaj). Pro tio estas preferinde, se eble, uzi skribmaŝinon. Se vi ne posedas ĝin, skribu per presliteroj. Letero, kiu estas bona el ĉiuj vidpunktoj, devas plenumi jenajn kondiĉojn:

- Ĝi estu klara, facile komprenebla kaj skribita en bona stilo,
- Ĝi estu konciza (t.e., vi ne uzu tro da vortoj aŭ tro da frazoj por esprimi viajn ideojn; antaŭ ĉio, vi evitu ripetojn),
- Ĝi ne lasu, ĉe la ricevonto, ian ajn dubon pri la celo, kiun vi volas atingi per via skribaĵo,
- Se vi skribas pri diversaj temoj en la sama letero, atentu, ke vi ne intermiksi ilin. Pritraktu ilin en logika sinsekvo kaj prefere marku ĉiun apartan temon per cifero aŭ per litero,
- Respektu la personon, al kiu vi skribas; priatentu lian aĝon, pozicion en la socio, lian edukitecon, kaj lian intelektan nivelon kaj, eventuale, lian sci-on pri la temo, kiun vi pritraktas. Neniam vi estu malĝentila, kaj via stilo neniam estu ofenda,
- Uzu korekte la interpunkciajn signojn (, ; ? " -).
- Ili funkcias por igi vian leteron pli facile legebla,
- Vi klopodu eviti, ke via letero impresu, kvazaŭ ĝi estus laŭvorte tradukita el via nacia lingvo.



"Ke vi neniam faru promesojn! "

KIO ESTAS HONESTECO?

En komerca entrepreno la direktoro, iun tagon, donas al juna oficisto jenan bonan konsilon: "Mia kara, se vi volas sukcesi en la komerca vivo, neniam malatentu du gravajn principojn, honestecon kaj sincerecon."

"Kaj," demandis la junulo, "Kio estas honesteco?"

"Honesteco estas, ke vi neniam rompas vian promeson."

"Kaj kio estas sincereco?"

"Ke vi neniam faru promesojn!"

OFICIALA INFORMILO

N-ro 448, 1 aŭgusto 1971

KOMITATANOJ B

Kiel anoncite en la n-roj 781 (p. 195) kaj 783 (p. 39) de "Esperanto", okazis la elekto de komitatanoj B por la 6 neokupitaj lokoj. La baloto okazis kun la limdato, la 30a de junio 1971. Por la nova elekto entute 8 kandidatoj estis nomitaj de po 5 delegitoj de UEA. Rajtis voĉdoni nur ĉefdelegitoj kaj delegitoj. En la 1a de julio, konforme al la artikolo 28 de la Ĝenerala Regularo de UEA, speciala komisiono nomita de la Estraro nombris la voĉojn. Entute estis ricevitaj 320 validaj kaj 1 nevalida voĉdoniloj. La rezulto estis jena:

I. Lapenna (Britujo)	288
J. Régulo Pérez (Hispanujo)	282
C. Støp-Bowitz (Norvegujo)	275
K. Söderberg (Svedujo)	251
U. J. Moritz (F.R.Germanujo)	228
K. Greutert (Svislando)	217
V. Novobilský (Ĉeĥoslovakujo)	211
F. Lautenbach (F.R.Germanujo)	95

Sekve estis elektitaj kiel novaj komitatanoj B: I. Lapenna, J. Régulo Pérez, C. Støp-Bowitz, K. Söderberg, U. J. Moritz kaj K. Greutert. 3 el la 6 elektitaj personoj jam eklaboris en la Komitato en Londono.

KONGRESURBO 1973 DECIDITA

Laŭ decido de la Estraro de Universala Esperanto-Asocio, la 58a Universala Kongreso de Esperanto okazos en 1973 en la ĉefurbo de Jugoslavio, Beograd. La decido sekvas inviton de Jugoslavia Esperanto-Ligo, kiun apogas la lokaj aŭtoritatoj.

Por la jaroj 1974 kaj 1975 ankoraŭ ne ekzistas definitivaj decidoj.

NOVA FAKA ASOCIO KUNLABORANTA

Subskribis kontrakton pri kunlaboro kun UEA nova faka asocio, Frateca Esperantista Movado. Ĝi estas asocio kreita en la kadro de la movado 'JEAN', kies ĉefa sidejo estas en Ĝenevo kaj kiu zorgas ĉefe pri persona formiĝo en la perspektivo de homaro fratece unuigita kaj komunume organizita. FEM celas akceli lernadon de Esperanto kaj konigi la spiriton, kiu vivigas ĝin. Ĝi estas akceptita kiel neneŭtrala asocio en la senco de artikolo 16 de la Statuto de UEA.

POŝTAJ KODNUMEROJ

En multaj landoj la poŝtaj aŭtoritatoj jam enkondukis regionajn, urbajn kaj/aŭ kvartalajn kodnumerojn ĉe la poŝtaj adresoj. Por helpi la aktualigon de la adresaro de membroj en la Centra Oficejo, la membroj bonvolu laŭeble kompletigi sian adreson per la ĝusta kodnumero, kiam ili sendas adresŝanĝon aŭ pagas la kotizon. Dankon!

NE PLU VALIDAS (en Jarlibro 1971/I)

— Pro adresŝanĝoj kaj aliaj kaŭzoj

Aŭstrujo: Wien (FD naturismo). **Brazilo:** Rio de Janeiro (FD informado). **Danlando:** Gentofte. **Finnlando:** Pietarsaari. **Francujo:** Pamiers. **F.R.Germanujo:** Au, Gladenbach, Merken, Selm. **Hispanujo:** Sabadell (FD bredado), Zaragoza (FD instruado). **Italujo:** Meolo, Pisa (FD aŭtomatoj), Vercelli (FD filatelo, geodezio, turismo). **Jugoslavio:** Ljubljana (FD juro). **Usono:** Rosemead (FD).

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Giessler, s-ino E.; Lahr, F.R.Germanujo
Kovarik, Frank; Brookfield, Usono
Mercure, Fernand; Lauzon, Kanado.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1971

237 Fóscolo, d-ro Hugo; Brazilo. 238 Micoud, F.; Francujo. 239 Spirat, Horst; F.R.Germanujo. 240 Knoflach, F.; 241 Viti, Giulio; Italujo. 242 Fortuin, J.L.W.G.; Nederlando. 243 Bugge-Paulsen, Kapt. R.; Norvegujo. 244 Cole, s-ino V.D.; 245 Oehler, Rene; Usono.

DONACOJ (gld.)

Eldona Fondaĵo: Francujo: G. Lemazurier, 6,—. Sumo ĉijara ĝisnuna 6,—.

Fondaĵo Canuto: Finnlando Y. Väisälä, 100,—. Svedujo: E. Carlén, 9,50. Sumo ĉijara ĝisnuna 445,04.

Fondaĵo Enciklopedio de Esperanto: Hispanujo: d-ro P. Arranz, 25,—. Sumo ĉijara ĝisnuna 165,42.

Ĝenerala kaso: Francujo: f-ino C. Hueter, 8,50. Hispanujo: d-ro P. Arranz, 22,50. Nederlando: G. L. Bouwman, 30,—; ges-roj van Woerden, 4,40. Svedujo: Sven Möllestad, 13,89. N.N., 3,50. Sumo ĉijara ĝisnuna 3 210,45.

Teatra Konto: Nederlando: d-ro W. Verloren van Themaat, 7,90. Sumo ĉijara ĝisnuna, 7,90.

Kampanjo "100 x 100": (Por ke 100 personoj devigu sin donaci ĉiujare dum tri jaroj ekde 1971 po 100 gld. aldone al la kutimaj kotizoj kaj donacoj.)

35 f-ino Emmi Stox, F.R.Germanujo.

36 W.L.Simpkins, Britujo.

37 d-ro P. Arranz, Hispanujo.

Patrono A de TEJO: 39 R. Bernard; 40 J. Chapelier; 41 Esperantista Grupo de Dijon; 42 F. Garrigue; 43 Lanzo; 44 C. Quarre; 45 M. Valluet; 46 s-ino R. Volpelière; 47 E. Worowniak, Francujo. 48 C. Foà; 49 G. Spertini; Italujo. 50 R. Lindblom; Svedujo.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo.

Universala Esperanto-Asocio



ANONCETOJ

Tarifo: po 0,25 gld. por ĉiu vorto. Pri la enhavo de la anoncetoj kaj anoncoj respondecas sole nur la anoncantoj.

Kun knabino, knabo de iu ajn nacio pri ia ajn temo deziras korespondi 18-jara hungara gimnaziano Bohár Isuzsanna, Nagygyörbő, Veszprém megye, Hungarujo.

18-a Aŭstralia Esperanto-Kongreso, Januaro 2-8, 1972. Esperantaĵa Konkurso. Queen's College, Melbourne, Viktorio, Aŭstralio. La personoj, kiuj sendos la dek plej bonajn esperantaĵojn (bildkartojn, ilustritajn salut-leterojn, gazetojn ktp.) ricevos premiojn. Sendu esperantaĵojn al A. C. Heathfield, 128 Broughton Road, Surrey Hills, Victoria 3127, Aŭstralio.

Estas serĉata presejo, kiu volas presi tradukon de la konata verkaĵo "Nada, la Lilio" de H. R. Haggard. La amplekso de la tradukaĵo estas 36 ĉapitroj sur 390 tajpitaj paĝoj. Skribu al: L. A. Ware, 1265 Melrose Ave., Iowa City, Iowa 52240, Usono.

Salutu la Nov-Zelandan Esperanto-Kongreson en Wellington 6-10 de januaro 1972. NZEA, P.O. Box 330, Wellington, Nov-Zelando.

Jerusalemano, oficisto, deziras edziĝi al bela samideano ĝis 34-jara kaj petas leterojn kun bildoj. Josef Schlesinger, Hungaria 207, Jerusalem, Israelo.

Kolektantoj aĉetu parton de mia kolekto. Sendu tri irk-ojn por: 50 E-glumarkoj, aŭ 2 unuataĝaj kovertoj, aŭ 50 uzitaj poŝtmarkoj. Aldonu unu irk-on por aerrespondo. E. C. Harler, 47 Hardy Road, Levittown, Pa. 19056, Usono.

Skribante al UEA, oni bonvolu enmeti kelkajn uzitajn poŝtmarkojn en la koverton, kio multe helpas al UEA finance. Antaŭdankon!

Survoje al Portlando, partoprenu la 14an Kanadan Kongreson de Esperanto en Victoria, Brita Kolumbio, la 24an, 25an, 26an de julio 1972. Unutaga karavano al Portlando la 27an. Skribu al la sekretario, K. K. de Esperanto, 1712 Haultain St., Victoria, B. C., Kanado, por informilo kaj aliĝilo.

33-jara lingvo-instruisto kaj verkisto serĉas korespondantojn el ĉiuj landoj pri enigmoj de arkeologio, prahistorio, pri ebla ekstertera inteligenta vivo, pri estonteco de nia mondo. Kiu cedos aŭ revendos la unuan parton de "Gvidlibro por supera ekzameno" (redaktis A. Pechan)? Bonvolu skribi al Mikelo Englebert, 47 rue Albert 1er, B-4280 Hannut, Belgujo.

Korespondi kun la tuta mondo deziras Walter Wichmann, D-6200 Wiesbaden, Luxemburgplatz 4, F.R. Germanujo.

Libroj pri Bahaa kredo: Mi aĉetas librojn pri bahaa kredo en Esperanto, novajn aŭ uzitajn, speciale tradukitajn de Lydia Zamenhof, pionirino de tiu monda religio. Ofertojn sendu al: M. Freitas, Rua Anselmo Braancamp 259, Porto, Portugalujo.

Tutmondaj sinjorinoj: Mi bezonas tipajn kaj ekzotikajn kuirartajn receptojn por publikigi libron pri kuirarto. Ĉiuj ricevos donacon. Francisco Rueda, Ancha 14, Jaen, Hispanujo.

De la revuo Internacia scienca gazeto mankas al mi nur n-ro 42, junio 1907. Kiu povas helpi min? Ramón Molera, Sta. Joaquina 13, Moyá (Barcelona), Hispanujo.

S-ino Stefania Sjögren de Malmö, Svedujo, kaj nederlanda esperantisto Cornelis Dirk Pothuizen geedziĝis je la 28a de majo 1971 kaj ilia komuna aktuala adreso estas: Hilversum, de Bazelstraat 32, Nederlando.

Instruistoj! Sukcesigu gravan per-Esperantan eksperimenton! 20 francaj instruistoj deziras enkonduki korespondadon inter sia kaj alilandaj klasoj. Detale informas: Lentaigne, 3 av. Gaillarde, F-34-Montpellier, Francujo.

Koloran faldfolion en Esperanto, pri la urbo Örebro en Svedujo, vi ricevos senpage. Petu ĝin ĉe Turistbyrån, Storgatan 1, S-703 61 Örebro, Svedujo.

Mezaĝa ekonomiisto ligos tutmonde diversteman korespondadon, precipe pri moderna vivostilo. Bonvolu skribi: Zdzisław Kurzawa, Sikorskiego 10/10, Górzów Wlkp., Pollando.

Nova Esperanto-klaso por komencantoj komenciĝos en Suda Kimrujo en septembro. Bonvolu, mi petas, sendi bildkartojn al: Esperanto Class, Cwmcaron Community Centre, Chapel Farm, Cross Keys, Mon., Britujo. Ni respondos al ĉiuj.

Institucio Hodler '68 varme atendas vian subtenon, ĉu per prunto de minimume 1000 gld., ĉu per donac(et)o. La institucio fondiĝis en 1968 por plisolidigi la financan bazon de UEA. Detale informas la administrantino: f-ino M. H. Vermaas, Nieuwe Binnenweg 70 II R, Rotterdam-3002, Nederlando.

KORESPONDEMULOJ

Se vi publikigas korespondo-peton en nia revuo, kunsendu vian FOTON. Ĉiumonate la redakcio elektos kelkajn fotojn de korespondantoj-anoncantoj por SENPAGA aperigo apud la koncernaj pagitaj anoncetoj! Kaptu la okazon!

ÅRHUS

La internaciaj feriaj *aŭtunaj* Esperanto-kursoj okazos 17. — 23. de oktobro en la altlernejo JUNAJ HEJMOJ (tute moderna) en Århus, Danlando. Venu por ĝui belan feriosemajnon en vere Esperanta rondo kaj en regiono kun aŭtun-koloraj arbaroj apud blua maro. Prospekto senpage havebla ĉe

L. Friis,
Ingemannsvej 9,
DK-8230 Åbyhøj,
Danlando.

Nun ĝi estas preta,

la GRAMOFONDISKO kun la himnoj: *Ho, dolĉas...*,
Tagon nur..., *Li pri danĝer'...* kaj *Neniam mi...*

Solkantistino: Margit Håkansson-Frisell. Aĉetebla ĉe Förlag Gröna Stjärnan, Fack 7, S-686 00 Sunne, Svedujo.
Prezo: 12,— sv. kr. inkl. sendokostojn.

Ĉu vi jam legis?

IMPERATIVOJ DE LA VIVO

de H. Rohden

Moderna filozofo en la moderna mondo. Li montras la vojon al paco kaj feliĉo.

Ĉe Libroservo de UEA — 2,70 gld.

Nepre legotaj: LA EVANGELIO LAŬ SPIRITISMO
La Libro de la Spiritoj — La Libro de la Mediumoj

La vera vojo al la spirita vivo,
al la vera kristanismo.

Eldonis: Federação Espírita Brasileira — Brazilo.
Mendebla ĉe Libroservo de U.E.A.



Aperis nova eldono de la **seslingva faldfolio** en la *angla, araba, franca, germana, hispana & rusa* lingvoj.

Prezo: 0,08 gld. plus sendokostoj 10%. Mendu ĉe
Libroservo de Universala Esperanto-Asocio.



**Sendu poŝtkarton al Turku,
vi povas gajni belan pupon!**

Pro nia kutima aŭtuna festotago, La Tago de Turku, ni aranĝas nun konkurson por la tuta esperantistaro en la mondo! Vi devas nur sendi poŝtkarton al la adreso: **LA TAGO DE TURKU, Box 66, SF-20100 TURKU 10, Finnlando**. Inter la senditaj kartoĵoj oni lotumos dek belegajn pupojn. La kartoĵoj devas esti en Turku antaŭ la fino de oktobro — 31.10.1971. Sendu vian karton tuj, jam hodiaŭ!

URBA TURISTA OFICEJO
Turku, Finnlando

1871?

Gratulon, se vi estas centjara. Oni admiras vian aspekton kaj akceptos ĝin. Centjarulo ja devas aspekti centjara.

Se vi naskiĝis en 1971, tiam vi aspektu laŭ 1971. La modo ŝanĝiĝis de 1871. Eĉ de 1932. Aŭ 1959.

Vi volas, ke viaj presaĵoj aspektu modernaj. Laŭ 1971. Broŝuroj, libroj, gazetoj. Reklamfolioj. Vi volas, sed eble ne scias.

Formo&Linio scias kaj volas. Klarigu vian problemon kaj ni trovos solvon al ĝi.

FORMO&LINIO

Myggdalsvägen 123, S-135 00 Tyresö, Svedio